HUNGARA VIVO

II

1980

11,– Ft

Dum ekskurso, ĉe sporto,

en teo, en limonado

MIKÖV

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1725 Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefono: 476-716, 573-088

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H—1081
Poŝta adreso: Budapest,
Pf. 193, H—1368
Aperas dumonate
XXa jaro, 1980 n-ro 2
(90)

ENHAVO

Rados, P. A.: Li estus nur 75-jara 42
József, A.: Ĉe Danubo *(K. Kalocsay)* — — — — — 43
József, A.: Redaktora Mesaĝo *(P. A. Rados)* — — — — — 44
Knichal, O.: Bardo de mia animo 45
József, A.: Senespere *(M. Fejes)* 45
Benczik, V.: Prezoj kaj produktokostoj — — — — 46
Fenyvesi, E.: 35 jaroj — — — — 47
Lengyel, M.: La mirinda mandareno *(V. Benczik)* — 48
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo *(VHZs)* 52
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 6. *P. A. R.)* — — 54
Goĥŝtejn, V.: Memore pri du revolucioj — — — — — — 56
V. B.: Donaco el Japanio — — 56
Ĥarkovskij, A.: Kiu scias dekojn da lingvoj *(P. A. Rados)* — 57
Julius Balbin: Mauthausen — — 58
Gergely, M.: Realo kaj arto — — 59
Farkas-Tatár, É.: Panoramo — — 60
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj — 63
Fenyvesi, E.: Genia verkisto kaj humanisto de la mezepoka Vjetnamio Nguyen Trai — — 64
Nguyen Trai: Nokte en sampano, Letero al Vuong Thong, Reveno al Con Son en sampano, Maljusteco, vespero, Konfeso de kredo — — — — — — — 65
D-ro László, F.: Budapeŝto, la urbo de banejoj II. *(E. Fenyvesi)* — — — — — — — — — 66
Fejes, M.: Literatura metiejo — 74
E. F.: Gaja paĝo — — — — — 76
Recenzo — — — — — — — — 76
Paĝo de komencantoj; La plej forta (Nanaja fabelo) — — — 77
Draĉ, I.: Balado de malfermitaj infanaj okuloj *(N. Andrianova)* — — — — — — — — 77
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko — — — — — — — — 79
Krucenigmo — — — — — — — 79
Leterkesto, Korespondi deziras — 80

Sur la titolpaĝo la Hungara Nacia Muzeo laŭ samtempa grafikaĵo

La 11-a de aprilo...

estas duobla festo por hungaraj poeziamantoj: ĝi estas la naskiĝtago de unu el la plej grandaj hungaraj poetoj, Attila *József* (1905—1937), kaj samtempe la Tago de Poezio. La rememorado pri Attila József kaj la festo kaj revuo de la moderna hungara poezio bele kombiniĝas en tiu tago.

Attila József ĉi-jare fariĝus 75-jara, se la kruelaj sociaj cirkonstancoj ne pelus lin en memmortigon antaŭ 43 jaroj. Lia poezio ĝis nun restis plene vivanta en nia lando, kaj fakte li estas unu el tiuj malmultaj hungaraj poetoj, kiuj sukcesis iom populariĝi ankaŭ en aliaj regionoj de la mondo, trarompinte la lingvan izolitecon de la hungara literaturo.

Alia jubileanto en tiu ĉi numero estas Menyhért *Lengyel:* li naskiĝis en 1880. Ni omaĝas al lia memoro per aperigo de lia verko *La mirinda mandareno,* kiun alia granda hungara artisto — Béla *Bartók* — jam faris mondkonata en alia ĝenro. Ni havas la firman esperon, ke ĉiuj ŝatantoj de la bela baleto volonte legos ankaŭ la tekston de Menyhért Lengyel.

Ni dediĉas du paĝojn al tria jubileo, tamen ĉi-foje ne hungara. Temas pri la elstara figuro de la klasika vjetnama literaturo, *Nguyen Trai,* kiu naskiĝis antaŭ 600 jaroj. Aperigante ĉerpaĵojn el la verkaro de tiu impone multflanka homo, ni volas ankaŭ kontribui al la kunlaborado inter hungaraj kaj vjetnamaj esperantistoj. Ni esperas, ke la tradukoj, kiujn ni faris el la franca lingvo, povis konservi almenaŭ iom el la speciala aromo de la verkoj de Nguyen Trai. Volonte ni legos pri tio la opinion de niaj vjetnamaj legantoj.

Male al nia kutimo, originalaj verkoj kaj recenzoj ricevis malmultan spacon en tiu ĉi numero. Tamen, eble tiel pli bone reliefiĝos la korprema beleco de la majstraj poemoj de *Balbin* kaj *Tófalvi.*

Artikolo primemoras la 35-an datrevenon de la liberiĝo de Hungario. Alia kontribuaĵo prilumas la novan sistemon de prezoj kaj produktokostoj, kiu celas pliigi la efikecon de la hungara ekonomio.

Interesa intervjuo, farita kun la estona profesoro *Ariste,* pruvas plian fojon, kiom ofte Esperanto havas stimulan rolon ĉe la starto de gravaj sciencaj karieroj.

La vica daŭrigo de nia literaturhistoria serio prezentas la verkaron de Sándor *Petőfi* kaj János *Arany,* el kiuj almenaŭ Petőfi jam estas intima konato de multaj esperantistaj libroŝatantoj.

Kvankam printempo proksimas, kaj la agrabliĝanta vetero povas esti danĝera konkuranto por nia revuo, ni esperas, ke la suno ne forlogos ĉiujn niajn legantojn, kaj kelkaj eĉ trovos tempon skribi al ni sian opinion pri tiu ĉi numero . . .

Li estus nur 75-jara

— Pensoj pri Attila József* —

En Lucerno iu esperantista poeto opiniis, ke la Ady-volumo de HEA estis superflua. Baldur Ragnarsson skribis pri la sama volumo malkompreneman recenzon. Kaj ili estas el niaj plej erudiciaj kolegoj. Kaj kion diri pri la aliaj?

Sed tamen ... Eble ni, hungaroj estas tro fieraj pri niaj poetoj. Tio eksplikeblas probable per la fakto, ke ĉe ni la literaturo ĝenerale kaj la lirika poezio speciale havas pli grandan rolon en la socia vivo ol ĉe aliaj nacioj. Sed veras ankaŭ tio, ke ni havas kelkajn tre grandajn poetojn, kiuj staras en la unua vico de la tutmonda liriko, eĉ se alinacianoj ne konas kaj ne komprenas ilin.

Petőfi, Ady, József — jen la fama hungara „triumviro" de lirikistoj, kies nomojn scias ĉiu lernejbubo en nia lando. Pri la unua ano de la triopo dank' al Kalocsay la erudicia esperantisto bone scias. Pri Ady ni — ankaŭ ĉefe el postrestintaj Kalocsay-tradukoj — strebis doni iom ampleksan bildon en volumo. (Ĉu vane?) Sed pri nia Attila József aperis nur kelkfoje mallongaj skizoj en HV kaj kelkaj tradukoj ĝenerale en la samaj numeroj. Nun ni volus denove montri lin. Sed ankaŭ tiu ĉi numero de la revuo ne donas kontentigan bildon pri la poeto. Nun mi provas tamen karakterizi lin, montri lian lokon en la hungara kaj iom en la tutmonda literaturo.

Li naskiĝis la 11-an de aprilo 1905 kaj mortigis sin la 3-an de decembro 1937. Li devenis el laborista familio. Patro — sapkuiristo, patrino — lavistino. La patro forlasas la edzinon, la du filinojn kaj Attilan, la trijaran filon. Li iras al „Ameriko", fakte al Rumanio. La familio pensas lin mortinta.

Sekvis malfacila infanaĝo: stif-gepatroj, denove la patrino, kiu ekmalsanis je kancero. La mizeroj de la unua mondmilito, revolucioj, kontraŭrevolucio, la morto de la patrino, gimnaziaj jaroj, la unua poezia volumo kun maturaj poemoj en la aĝo de 17 jaroj. Universitato. Forpelo el la Szeged-a „Alma Mater" pro la poemo Kun Pura Koro. (La universitato hodiaŭ havas lian nomon.) Vieno. Parizo. Alianco Anarko-Komunista. Budapeŝto. Dume novaj volumoj. Partopreno en la neleĝa Hungarlanda Partio de Komunistoj. Faŝismiĝo de Hungario. Procesoj pro poemoj kaj volumo. Disputoj kan la reprezentantoj de la reakcia kaj tiuj de la liberala literaturo. Konfliktoj ankaŭ en la partio. Forresto el la komunista movado. Neŭrozo. Psikoanalizo. Skizofrenio. Samtempe geniaj poemoj. Manko de la rekono. Mizero. Senlaboreco. Malfeliĉaj amoj. Graviĝo de la malsano. Memmortigo (li ĵetis sin antaŭ ŝarĝtrajnon).

Jen vivo en telegrama stilo. Sed kion diri pri Attila József, la poeto? „Li estis proleta poeto" — mi lernis en la lernejo. Ĉu vere? Li fakte naskiĝis en proleta familio. Pri la suburbo li diris: „mia patri' ". Li verkis klasbatalajn poemojn. Sed same li skribis: „Mi ankaŭ la proletecon vidas formo kiel en la poezio, tiel en la socia vivo, kaj en tiu senco uzas ĝiajn motivojn ..." La poeto marksista konis — eĉ tre profunde — ne nur *La Komunistan Manifeston* kaj *La Kapitalon*, sed ankaŭ junaĝajn verkojn de Karl *Marx*, kiuj detale analizas la fenomenon de la fremdiĝo. El ili li sciis: la „proleteco" kaj la „burĝeco" estas formoj, kiuj kovras kaj samtempe esprimas „la esencon homan". Tiel li povis esti samtempe poeto de la proletaro kaj tiu de la tuta homaro.

„Li estis poeto socialista — diris pri József la pli juna kolego, mia ŝatata profesoro, László *Bóka* (1910—1964). — Mi scias, pli trankvilige estus skribi: la poeto estis socialisto. Sed mi ne havas la eblon priatenti tiun ĉi delikatecon. (...) Multaj kredis kaj kredas pri si, ke ili estas poetoj socialistaj, kvankam ili ne estas tiuj. Attila József (...) sendepende de tio, kion li pensis pri si, tio estis. (...) Se ekzistas verkisto, prenanta la inspiron el tiu fakto, ke la homaro dividiĝas je klasoj, kaj liaj plej intimaj direndoj plej bone klarigeblas per lia klasaparteno, tiam tiu ĉi vidmaniero havas devigan forton, eĉ se oni alimaniere vidus la dividiĝon de la homaro ol la verkisto." Fakte. Attila József skribis:

Mi vin bezonas, Flora, kiel puton,
lernejon, domon, lumon la vilaĝo,
kiel infanoj varton kaj la ludon,
konscion homan laborista klaso ...

Eĉ en la amo, en la plej intimaj sentoj la poeto uzas komparojn, prenitajn el la socia vivo, kaj faras tion artisme. Por li la proleteco vere estis formo. Liaj poemoj sur la plej alta nivelo esprimas la tuton de la homa vivo, tial Attila József estas kara kaj amata poeto de multegaj hungaroj. „Socialisto, freŭdisto, neŭropato, heroo, memmurdinto, amanto, sed poeto, poeto, nure kaj unuavice poeto" — karakterizas tiun ĉi fenomenon de la liriko hungara László *Bóka*.

Malpli fama, malofte kaj en malmultaj ekzempleroj eldonita estas la proza verkaro de la poeto. En artikoloj, en studoj parte finitaj, parte fragmentaj, montriĝas bildo de vere „dokta" poeto, kiu bone konas la freŝajn atingojn de la natursciencoj, tiujn de la psikologio, krom la marksismo la filozofion de Hegel, Feuerbach, Bergson, Croce kaj aliaj. Kaj malgraŭ la eraroj, en liaj verkoj estas ĝis nun validaj problem-solvoj. Liaj leteroj montras homon afablan, amindan.

La hungara poezio multe ŝuldas al Attila József. Ne ekzistas poeto en Hungario, kiun ne influis lia poezio. Multaj el ili eĉ skribis poemojn al „Attila", kiel oni ĝenerale ĝis nun nomas la poeton.

Post la morto la nekomprenon iom post iom anstataŭis rekono kaj admiro. En 1938 li ricevis postmortan Baumgarten-premion, kiun dumvive li

*Prononcu: atilla joĵef

Attila József:

Ĉe Danubo

I.

Mi sidis sur plej suba ŝton' de l' bordo,
rigardis, kiel melonŝelo naĝas,
apenaŭ aŭdis, drone en mia sorto,
ke, dum profund' silentas, supro klaĉas.
Danubo estis, kvazaŭ elfluanta
el mia kor', malklara, saĝa, granda.

Kiel muskoloj, se la hom' laboras,
brikfare, fajle, fose aŭ martele,
ŝajnis ke tiel pranci nun fervoras
ĉiu ondmovo streĉe kaj malŝvele,
kaj kiel panjo, ĝi fabelas, lula,
malpuron de la urbo lavas pura.

Ekgutis pluv', sed, kvazaŭ ĉi klopodo
ĝin tedus — estas ja egale — haltis,
sed, kiel hom' pri longa pluv' el groto
gvatadas, la pejzaĝon mi rigardis.
Kaj pluvis flegme la eterne-fala
paseo, iam bunta, nun jam pala.

Fluis Danub'. Kaj kiel al patrino
fekunda kaj pensanta pri alio
la infaneto ludas en la sino,
alridis ondoj en lud-idilio,
samtempe ili ŝajnis, en sinrompoj,
kadukiĝinte enfalantaj tomboj.

II.

Mi estas jene: kion en minuto
mi vidas, mi rigardas tion de centmil jaroj.
Moment' — kaj preta jam la tempo-tuto,
kaj ĝin kun mi rigardas centmil praulaj paroj.
Mi vidas, kion ili vidpreteris,
ĉar ili rastris, murdis, brakumis, laŭ neceso,
kaj vidas, kiuj dismaterieris,
kion mi mem ne vidas, se urĝas min konfeso.
Ni scias pri ni, kiel ĝoj' kaj ploro,
al mi pase', al ili nuntempo apartenas,
ni versas — mi memoras; dum memoro
mi ilin sentas, ili krajonon mian tenas.

III.

Panjo kumena[1]*, patr' estis sikulo*[2]
duonrumana, eble tute tia,
el panja buŝo dolĉis la manĝbulo,
el patra buŝ' la ver' estis radia.
Ĉe mia mov' — jen ili en brakumo;
kelkfoje min pro tio trist' alspiras:
jen la forpas'. Jen mia naskohumo.
„Vidu, se ni ne estos!" — ili diras.
Ho, diras ja, ĉar ili estas mi jam,
jen, malgraŭ feblo, mia fortoŝvelo;
mi scias, ke ol mult' mi estas pli jam,
ĉiu praulo, mi, ĝis la praĉelo,
praulo, kiu plimultiĝon ĝuas,
mi iĝas patro kaj patrin' feliĉe,
kaj ankaŭ patro-panjo mem disduas:
mi tiel iĝas Unu plimultiĝe.

La mondo, kio estis, estas — jen mi,
la multaj gentoj inter si militaj,
la patruj-konkerantoj venkas en mi,
turmentas min sufero de l' venkintaj.
Dózsa[3]*, Werbőczi*[4]*, Arpad*[5]*, Zalan'*[6] *tumultas,*
rumanoj, slavoj, turkoj kaj tataroj
en koro, kiu al paseo ŝuldas
futuron mildan, nunaj ni, hungaroj.

Laboron al mi! Por batal' sufiĉas
konfesi pri la tempoj la ĝisnunaj.
Paseo, nuno kaj futur' kuniĝas
en ondoj de Danub' interbrakumaj.
Praulajn luktojn solvas nun intime
en pacon la memoro remigranta.
Niajn aferojn kunajn ordi fine
jen nia tasko, kaj eĉ ne malgranda.

El la hungara: K. *Kalocsay*

---

ne atingis, en 1948 jam la nova Hungario kune kun Béla Bartók ankaŭ lin distingis per postmorta Kossuth-premio.

Komenciĝis ankaŭ batalo: al kiu apartenas Attila József? Multaj tendencoj, skoloj provis montri lin kiel sian praulon, ĉar en liaj poemoj troviĝas ĉio: de la popoleska naiveco ĝis la filozofia abstrakteco, de la pleja simplo ĝis la apenaŭ komprenebla kompliko, de la soneto ĝis la heksametro kaj la Whitman-eskaj „liberaj versoj".

La batalo daŭras. Ĉu ĝi iam finiĝos entute? Mi same povus daurigi miajn pensojn sed ĉi-okaze mi finas. Eble iam mi povos daŭrigi ilin.

Péter András *Rados*

[1] Nomada popolo, kiu en la 13-a jarcento aliĝis al la Hungara Reĝlando. Iliaj posteuloj — lingve jam tute hungariĝintaj — vivas en la norda parto de la Granda Hungara Ebenaĵo.

[2] Hungaraj loĝantoj de Transilvanio (en Rumanio).

[3] Estro de kamparana ribelo en 1514, pron. „doĵa".

[4] Redaktinto de jura libro post la subpremo de la ribelo de Dózsa. Tiu libro dum pluraj jarcentoj servis kiel baza jura libro de la hungara feŭdismo, pron. „verböci".

[5] Estro de la hungaroj fine de la 9-a jarcento p. K., kiam ili konkeris la nunan teritorion de la lando.

[6] Estro de la popolo, loĝanta la nunan teritorion de Hungario en la 9-a jarcento p. K.

En la lastaj du jaroj de sia vivo Attila József estis literatura redaktoro de la revuo Szép Szó (Bela Vorto). La sekva artikolo el la jaro 1936 aperis en la dua eldono de la unua numero de tiu periodaĵo. Ĝenerale la redaktoraj mesaĝoj ne estas longtempe validaj literaturaj verkoj, kaj fakte neniam eniras memornumerojn de gazetoj. Sed la sekva „mesaĝo" estas escepto, ĉar ĝi fakte estis konfeso de Attila József. En la artikolo montriĝas la matura poeto-filozofo, kies pensoj ankaŭ hodiaŭ efikas freŝe. Tial ni el la kvar-parta artikolo aperigas — iom mallongigite — la unuajn tri partojn.

Redaktora Mesaĝo

Attila József

Kara Sinjoro! Al viaj honorigaj riproĉoj, faritaj inter la apero de la unua kaj tiu de la dua eldonoj de *Szép Szó* (Bela Vorto — Red.), mi havas la honoron respondi la sekvajn:

1. Vi diras, ke nia celo estas disvastigi la malkredemon. Vi eraras. La malkredema estas Vi. Vi akcentas, ke Vi estas katoliko. Sekve Vi ne kredas je la budaismo, je la islamo je la protestantismo, je la paganaj mitologioj, Vi ne kredas je la socialismo, kaj je la natursciencoj, Vi ne kredas je la demokratismo kaj tiel efektive Vi ne kredas ankaŭ je la aŭtoritatoj. (. . .) Nur pere de senfina vicigo eblus nomi ĉion, kion ne kredas — Vi. Mi kredas. Marx skribas: la religio estas realigo de la homa esenco — en la fantazio, ĉar en la tera lamento-valo (kies milita mapo montras subpremadon kaj ekspluatadon de klasoj, rasoj, seksok kaj generacioj) la homoj ne povas realigi sian veran esencon, kaj ĉar ili ne povas ĝin realigi, ili ankaŭ ne povas konsciiĝi pri ĝi senpere. Jen, surbaze de tia „malkredemo" mi povas kredi je ĉiuj religioj, ankaŭ je la Via, sen esti en kontraŭdiro kun mi mem, kaj malrespektante la intelekton, malestimi min mem kaj Vin. (. . .)

2. Vi skribas, ke Vi kun plezuro legis kelkajn miajn poemojn, en kiuj aperas vera konscienco pri la peko, kaj mi tamen restis malkredema. Kara Sinjoro, mi kredas je la origina peko kaj tial mi estas adepto de la scienca socialismo. Ĉar ekzistas duspecaj pekoj. La unuaj estas pekoj nur tial, ĉar ili estas punataj pro la speciala zorgo de la regantaj potencoj teraj. La infano ploras, ĉar ĝia ventro doloras — ĝi do estas minacata por ne ploraĉi ĉiutempe. La senagra kampularo, milionoj da senlaboruloj provas organiziĝi por plibonigi sian sorton, ĉar ili vivas en nekredebla mizero — ili do estas minacataj perdiktature por ne ĝeni la ordon. Tiuspecaj pekoj estas tre facile likvideblaj ekz. per tio, ke ili ne estas punataj. Kontraŭ tiaj pekoj oni povas kaj devas batali — nome per certigo de la nepunateco, per institucĥiigita libero. La homaro dum sia tuta historio tiel batalis kontraŭ tiaj pekoj. La pekon de la sklavo-fuĝo, tiun de la servutulo-transloĝiĝo la socio likvidis tiamaniere, ke ĝi ne plu punis ilin; tiel, ke ĝi likvidis la sklavecon kaj la servuton. La alispeca peko estas, kiun oni faras senvole, kaj kiun la pekinto pripentas ankaŭ tiam, se li ne estas pro ĝi punata. Tiu estas la peko origina. Peko kontraŭ tiu, kiun oni amas. Kontraŭ tiuspeca peko ne sufiĉas batali per nepunado, tian pekon oni devas fakte pardoni unu al la alia. Tian pekon ne pardoni mem estas peko. En la diktaturoj, en la socioj, bazitaj sur la klas-subpremado kaj ekspluato de la fremda laborforto, la homaro suferas ankaŭ pro la peko de la nepardonado. Kontraŭ tiu ĉi peko fakte ne eblas agi alimaniere, nur per lukto por tia socia ordo, produktmaniero kaj distribua organizo, en kiuj la homoj pli facile pardonos unu al la alia. Vi ne devas forgesi ankaŭ tion, ke en la klasaj socioj la konscio pri tiuj pekoj, kiuj estas pekoj nur tial, ĉar ili estas punataj, nebuligas la konscion pri la originala, pri la kontraŭ-ama peko (se ĝi entute ebligas tion), kaj tiel malebligas, ke la homaranoj farigu pardonemaj.

3. Vi entuziasmiĝas pri la idealo de la ordo, sed fakte pensas pri la feŭda ŝtato. (. . .) Vi — ĝenerale — riproĉas min pro tio, ke mi forgesas pri la eternaj idealoj. Ankaŭ tiun ĉi eraron mi devas korekti. — Pri la eternaj idealoj Vi forgesas. La feŭda ŝtato versajne ne estas realigo de eternaj idealoj — ĝi ja havas ne tro multe da komuneco kun la idealoj de la homaj libereco, egaleco, frateco. Vi kompreneble kredas, ke tiuj idealoj estas idoloj de la burĝa revolucio Francia, diiginta la intelekton. Mi atentigas Vin, ke la libero, la egalo kaj la frateco estas ĉefidealoj de la katolikismo. Antaŭ Dio ĉiuj estas liberaj, egalaj kaj frataj. La burĝa revolucio nur alterigis tiujn idealojn, kiam ĝi faris principo, ke ankaŭ antaŭ la leĝoj de la ŝtato ĉiuj homoj estas liberaj, egalaj kaj frataj. Vi rememoru tion, kion mi diris pli frue, nome ke la religio estas realigo de la homa esenco en la fantazio. Kaj mi, kiel „senkreda materiisto" luktas por tio, ke tiu ĉi esenco, tiuj ĉi idealoj, se ne alimaniere, do iom post iom, tamen realiĝu ankaŭ en nia ĉiutaga vivo, ke ili estu direkto-principoj ekzemple en la ŝtat-administro kaj en la produktmaniero. (. . .)

Trad: *P. A. R*

„Bardo de mia animo..."

Asembleo de la Ligo de Nacioj en Budapeŝto, la jaro mil naŭcent tridek ses. Oratoras la mondfama ĉeha proz- kaj dramverkisto Karel Čapek. Apud Thomas Mann liaj vortoj rikoltis la plej grandan eĥon. Čapek parolis pri la duspeca utiligo de la tekniko, kiu — laŭ li — kapablas servi kiel la plej detrua potencrimedo, sed ankaŭ kiel batalilo kontraŭ la perforto, protekte al la homrajtoj kaj libereco. Traduko de lia franclingva prelego aperis samjare en la hungara literatura revuo *Szép Szó* (Bela Vorto). La tradukinto kaj redaktoro de la revuo, ĉeestinta la prelegon estis — Attila József.

Tio ne estis la unusola kontakto de Čapek kun la hungara literatura medio kaj — kvankam nerekte — ankaŭ kun Attila József. Nome, la spuro gvidas de Čapek al la tiutempe ŝlosila figuro de la hungara-ĉeĥoslovaka rilatado kultura, heroldo de la interkompreniĝo de ambaŭ popoloj, kulturataŝeo de la ĉeĥoslovaka ambasadejo en Budapeŝto: Anton Straka.

Straka estis persona konato de Bartók, Babits, Móricz kaj kamaradece rilatis kun Attila József. Konserviĝis entute tri leteroj de Straka, adresitaj al tiu ĉi lia amiko:

„Morgaŭ vespere ni kunvenos kiel kutime" — li skribas foje en septembro 1934 — „kaj nia gasto estos Josef Hora.[1] Bonvolu veni — ja eĉ kiel tradukanto de liaj poemoj. Ankaŭ Kosztolányi kaj Lőrinc Szabó partoprenos."

Tiu vendredo estigis fruktodonan amikecon inter la du proletaj poetoj. Hora pleje eksimpatiis por Attila József, kiu baldaŭ tradukis el liaj verkoj por la antologio de la ĉeĥaj kaj slovakaj poetoj, aperinta sekvajare en Budapeŝto. Siavice Hora parolis okaze de tiu ĉi evento en la elsendo de la slovaka radio, junion 1936.

Nur post la dua mondmilito la poemoj de Attila József atingis pli vastan rondon de la legantoj en Ĉeĥoslovakio. Le ĉeĥa kaj slovaka libroformaj prezentoj (ambaŭ en 1952) sekvis la polan (en 1936) kaj la francan (1945 en Svislando), aperinte samtempe kun la itala.

La dua reviziita ĉeĥa eldono en 1959 (entute 37 poemoj sur 194 paĝoj) estas merito de Vilém Závada[2], persona konato de la granda hungaro. Ambaŭ slovaklingvaj tradukoj, la dua plivastigita en 1968, aperis fare de Ján Smrek — verkisto renoma inter la literaturamantoj en Hungario — kaj ili estas konsideritaj eksterordinare altnivelaj interpretoj de Attila József.

Závada kaj Smrek, la du elstaraj poetoj kaj tradukistoj, intimaj konantoj de la hungara literaturo, dum longaj jaroj konfesas sian ligitecon al la verko de sia ŝatata aŭtoro. „Sen scii ion pri lia personeco — rememoras Závada sian konatiĝon kun la poemoj de Attila József preskaŭ antaŭ duonjarcento — mi tuj rekonis la poeton kun grandega lirika forto. Li akre diferencas ne nur disde la grandaj hungaraj aŭ ĉeĥaj, sed ankaŭ de la ceteraj poetoj, tiamaniere portante ankaŭ nefacilan taskon al la tradukisto. Tamen, kiam mi sukcesis trovi la ŝlosilon al lia vivoverko kaj solvis la hieroglifojn de lia poezio, antaŭ mi aperis reala kaj senkompata mondo sen mistifiko. Al lia personeco estas fremda la dolĉa beleco, li estas poeto de la soleco kaj malriĉeco, de la malriĉo senkompata kaj tiel animskue kaj materiisme priskribita, ke al tio ne eblas trovi analogaĵon en la mondliteraturo. Malgraŭ ĉiuj ĉi mizeroj lia interna mondo estas senlime riĉa. Mi amas lian simplanimecon infanan, lian malsimplecon, foje eĉ krudan, lian dolorigan grandiozecon. Li estas bardo de mia animo, mia granda frato..."

La originalan pensmanieron de Attila József, ensorĉitan en komplikan lingvon, foje enigman eĉ por la samlandanoj, plende-entuziasme menciis konekse kun la malfaciloj pri la elhungarigo de liaj poemoj ankaŭ Ján Smrek. Tiurilate malgrandaj nacioj estas malavantaĝaj, ĉar eĉ se iliaj literaturoj atingas mondnivelon, nur nemultaj alilingvanoj konas ties verkojn. Attila József estas mondnivela aŭtoro, kiun la tradukoj mondfamigis.

Laŭ Smrek la pli aĝa generacio de la slovaka intelektularo povis legi liajn verkojn en originalo sen aparta ĝeno; la tradukbezonon evidentigis la postmilitaj jaroj. Tio estis tasko efektive pretenda. Ĉar poeto, kiel Attila József profitas de la artismaj atingoj de sia epoko, de ties simboloj, metaforoj, figuroj. Kaj tiajn poemojn oni devus traduki en ĉiujn lingvojn de la mondo...

Oldrich *Knichal*

Attila József:

Senespere

Lante, medite

Homo alvenas fine, lante
al trista, malseka, sabla ter',
ĉirkaŭrigardas revadante,
kapjesas saĝe, sen esper'.

Ankaŭ mi provas samleĝere
rigardi ronden sen trompa vol',
vibras hakbato arĝenthele
sur foliaro de tremol'.

Sur branĉo de la neniarbo
timtremas mia kor' silente ,
ariĝas al la eta korpo
steloj, rigardas mildasente.

Sub firmamento ferkolora

Sub firmamento ferkolora,
dinamo malvarma giras,
Ho stelaro senbrua, fora!
Vort' ĉe dento sparke eliras —

En mi pasinto, kiel ŝtono
tra spaco adas per muta fal'.
Ŝvebas tempo de blua tono,
ekbrilas glavo: la harar' —

Lipharoj kuŝas —
raŭpoj grasaj —
sur la sengustaj lipbordoj.
Kor' doloras, frostiĝas frazoj.
Sed ja al kiu la vortoj —

El la hungara: Márton *Fejes*

N o t o j : [1] Ĉeha poeto 1891—1945), nacia artisto de ČSSR. Hungare aperis selektoj el liaj verkoj en 1959 kaj 1964; [2] Nacia artisto de ČSSR (nask. 1905). Hungare aperis lia poemaro en 1959.

Prezoj kaj produktokostoj

Verŝajne multaj niaj legantoj scias, ke meze de la pasinta jaro en Hungario la prezoj de praktike ĉiuj nutraĵoj estis altigitaj je ĉ. 20%, kaj signife kreskis ankaŭ la prezoj de multaj industriaj produktaĵoj. Samtempe oni decidis asigni certan monan kompenson al ĉiuj salajruloj, kaj estis altigita ankaŭ la sumo de la infaneduka helpopago. Tamen, tiuj kompensoj kovras nur ĉ. tri-kvarone la kreskon de la vivten-kostoj.

La homoj, kompreneble, ne aplaŭdis la prezaltigon, sed fakte neniu kontestis ĝian necesecon. La ŝtata budĝeto devis elspezi ĉiujare pli kaj pli altan sumon por la subvenciado de vendoprezoj, ja la produktokostoj senĉese altiĝis, dum la vendoprezoj restis plejparte senŝanĝaj. Ankaŭ nia ekstera komerco akumulis ne neglektindan negativan saldon. Sed pri tio poste.

Iom da historio

Ekonomiaj decidoj en ĉiuj socioj servas la specifajn politikajn celojn de la koncerna socio. Tiel estis ankaŭ en Hungario antaŭ pli ol 30 jaroj, kiam la socialisma prezosistemo estis enkondukita. Por likvidi la malsaton kaj mizeron, la prezoj de la bazaj necesaĵoj estis fiksitaj tre malalte. Tiamaniere ĉiuj povis aĉeti por si almenaŭ sufiĉe de nutraĵoj. La monon, necesan por tiu subvenciado, la ŝtato gajnis per impostoj, inkluzivitaj en la prezoj de industriaj varoj, kiuj en la tiamaj Hungarlandaj cirkonstancoj plejparte ne apartenis al la bazaj — kaj ĉefe ne al la ĉiutagaj — necesaĵoj. La prezoj de industriaj varoj estis fiksitaj pli alte ankaŭ pro alia kialo: tiamaniere la ŝtato volis stimuli la industrian produktadon, ja ĝia rolo en la tiama hungara ekonomio estis relative malgranda. En tiu sistemo formiĝis proporcioj iom strangaj: ekz. prezo de mezkvalita vira kostumo egalis prezon de ĉ. tridek kvin kilogramoj da bonkvalita bova viando.

Tridek jaroj de la hungara ekonomio

Sekve de tiu prezosistemo, la industria produktado rapide ampleksiĝis. Le evoluo ne estis seninterrompa kaj ĉiam ĝustadirekta, sed ĝi alportis multajn ŝatindajn rezultojn. Post kelkjara hezitado ankaŭ la agrikulturo ricevis la necesajn rimedojn kaj cirkonstancojn por la intensa evoluo, kaj nun Hungario kapablas ne nur certigi abundan enlandan oferton de nutraĵoj, sed povas ankaŭ eksporti signifajn kvantojn de agrikulturaj produktaĵoj.

Tamen, en tiu evoluo aperis ankaŭ misaĵoj, el kiuj la plej grava estas la superproporcia altiĝo de produktokostoj. Tiu altiĝo havas plurajn kaŭzojn, el kiuj plej ofte oni mencias la prezaltiĝon de energio kaj krudmaterialoj. Estas fakto, ke dum la lastaj jaroj seninterrompe kreskis la prezo de energio kaj krudmaterialoj, kiujn nia lando grandkvante importas, dum de la ekzistanta maŝinaro estas eksportataj de ni, apenaŭ ŝanĝiĝis. Tamen, ne temas nur pri tio. Multe kulpas ankaŭ la malbona organizo de laboro, kio rezultigas, ke la kapacito de la ekzistanta maŝinaro estas ekspluatita nur ĉ. 20%-e. (T. e. la maŝinoj funkcias nur ĉ. 4,8 horojn dum tago.) Tia malŝparo kompreneble grave — kaj malfavore — influas la produktokostojn. Kulpas krome ankaŭ la neefika mastrumado pri la homa laboro. Tre ofte okazas, ke du aŭ tri homoj faras laboron, kiun tute bone povus fari unu persono. Kaj vane la hungara salajronivelo estas malpli alta, ol ekz. la okcident-eŭropa, la salajrokostoj, pagitaj por tiu aŭ alia varo, tamen estas altaj en nia lando. Tiu sistemo kreas aliflanke iom fiktivan kaj certe relativan mankon de laborforto, kaj tio siavice plu malaltigas la ekspluatitecon de la disponata maŝinaro.

Nova sistemo de produktoprezoj

Oni devas diri, ke inter la ĝisnunaj cirkonstancoj la entreprenoj ne estis interesitaj en la malpliigado de la produktokostoj. La sola mezurilo ĉe la difino de la prezo de iu varo estis nur la kvanto de laboro kaj materialoj uzitaj por ties produktado. Oni tute ne ekzamenis, ĉu estis vere necese investi tiom da laborhoroj, materialoj kaj rimedoj entute?

Tiu — je la unua vido tre mallogika kaj malŝpara — sistemo kompreneble ankaŭ havas siajn historiajn kaŭzojn. Antaŭ tridek jaroj en Hungario ne ekzistis tiom da efektivaj laborlokoj, kiom da laborkapablaj homoj. Sed la socialisma ŝtato decidis nepre likvidi la senlaborecon. Tio eblis, nur se oni dungis foje-foje du aŭ tri homojn por laboro, kiun povus fari unusola persono. Tiu dungopolitiko antaŭ tridek jaroj estis nepre tre demokratia, ĉar la posedaĵon de la nacio — t. e. la disponeblajn laborlokojn, la fontojn de la vivtenado — oni disdonis egale al ĉiuj membroj de la nacio.

Malfavore influis la produktokostojn ankaŭ la grandegaj kvantaj pretendoj de la socio. Oni bezonis ĉiam pli kaj pli da varoj, por kontentigi la konstante kreskantan bezonon de la loĝantaro kaj de la vasta investa aktivado, kaj en tiuj cirkonstancoj la demando de produktokostoj estis triaranga, tiom pli, ke la lando ne havis signifan eksteran komercon, kaj tiamaniere mankis vera eblo konkrete kompari la enlandajn kaj internaciajn produktokostojn.

Nuntempe la ekstera komerco jam havas tre grandan signifon en la hungara ekonomio: ĉ. duono de la nacia enspezo realiĝas pere de ĝi. La eblo de komparo ne nur ekzistas, sed eĉ trudiĝas al ni. Kaj la rezulto de tiu komparo multrilate estas malfavora.

Ekde la komenco de tiu ĉi jaro oni enkondukis novan sistemon de produktoprezoj. Tio signifas, ke la entreprenoj ne povos inkluzivi en la prezoj ĉiujn efektivajn produktokostojn, nur la vere necesajn. La tuta sistemo baziĝos sur la prezoj, kutimaj en la internacia merkato. La ŝtato decidis ne plu subvenci malbone organizitan, malkompetente faritan laboron, ĝi helpos al la entreprenoj nur tiam, se malkonjunkturaj efikoj endanĝerigos ilian mastrumadon. Oni devas diri, ke tiu subvenciado eblis ankaŭ ĝis nun nur je la kosto de entreprenoj vere bone kaj efike laborantaj. Kompreneble, la entreprenoj ricevos certan tempon por akomodiĝi al la novaj postuloj, kaj fari la paŝojn necesajn: revizii la konsiston de siaj produktaĵoj, ĉesigi la produktadon de certaj varoj nepre malgajnigaj, enkonduki produktadon de novaj varoj, analizi la ĝisnunajn produktokostojn. La novaj preskriboj devigos la entreprenojn pli efike mastrumi ankaŭ pri la homa laboro, kaj tio espereble favore influos ankaŭ la ekspluatnivelon de la maŝinaro.

La nova sistemo neprigos, ke la ekonomiaj gvidantoj faru pli kompetentan laboron. Verŝajne ankaŭ nemultaj laboristoj devos forlasi sian nunan laborlokon — eble ankaŭ profesion — kej eklabori en alia branĉo de la produktado. Tamen, ili certe ne perdos la eblon de laboro: kiel jam aludite, multaj maŝinoj, nun ne funkciantaj, atendas ilin. Hungaraj laboristoj ne bezonas timi senlaborecon.

La ĵusa modifo de la sistemo de produktoprezoj ne estas nura ekonomia, sed ankaŭ politika decido. Politika decido, kiu celas la konstruadon de la evoluinta socialisma socio, kaj kreadon de kiel eble plej bonaj vivcirkonstancoj por ĉiuj laboruloj en la lando.

V. *Benczik*

35 jaroj



Panoramo pri la hodiaŭa Budapeŝto

ne prezentas rondciferon kutiman por jubileo. Eĉ tiam ne, se oni konsideras la 35 jarojn — forpasintajn depost la forigo de la Hungarlandon terure preminta faŝista jugo — kvazaŭ *triono de jarcento.* Ne tro longa periodo el homa vidpunkto, nek en la fluo de l'historio. Tamen tiu tempodaŭro montriĝis eksterordinare grava eĉ por la miljarope kalkulanta historio, krome ankaŭ la akceliĝanta moderna vivritmo plidensigis *tiun* jarcent-trionon. Indas halti do por momento, oferi kelkajn minutojn por levi nian spiriton al medito kaj ĉifoje *rigardi malantaŭen* — tio necesas ja por ekvidi novajn horizontojn.

Antaŭ iom pli ol unu jaro ankaŭ nia revuo rememoris pri la unuan mondmiliton sekvintaj Hungarlandaj revolucioj, 1918/19. Ambaŭ revolucioj: heroaj antaŭpaŝoj. Ambaŭ revolucioj kune finis per sinko profunden — kaj kun ili ankaŭ la tuta nacio. Jam delonge antaŭ 1918 ŝvebis la minaca postrestinteco super la Hungarlanda ekonomio kaj kulturo, eĉ kompare al la meznivelaj landoj de Eŭropo. Kiel oni certe rimarkis en la literaturaj pecoj de tiu epoko, kiujn H. V. publikigis, *ĉio kriis* en la lando averte por ŝanĝoj jam ne prokrasteblaj. La mizere malfavora historia situacio *tamen* fiaskigis la revolucion... kaj prokrastigis la ne-prokrasteblan!

Dum nia epoko oni spertis ofte ian similan: la nulpunkton — ŝajne jam ne malsupereblan — je ĉies surprizo sekvi povis pli profundaj inferoj. En freneza mortodanco puŝis—tiris la revolucion frakasintaj (eksteraj kaj internaj) reĝimoj Hungarlandon pli kaj pli profunden, tra paca mizero al la mondmilita amastombo. Ne temas pri stagnado, male: pri senfina glitado en vulkaninternon kie la svenanta popolforto cedis al la faŝisma detruemo. La nacia tragedio de 1944/45 iĝis totala — preskaŭ...

El tiu infera kratero la nacio ne povis retiri sin mem, tion kapablis nur ekstera, eksterordinara forto. La venkanta soveta armeo, kune kun la popolaj armeoj de la bulgara, jugoslava kaj rumana antifaŝismo, havis la eblecon *realigi la 400-jaran revon* hungaran: definitive forpeli la germanan imperiismon, kontraŭ kiu ĝisfiaske batalis tiom da herooj historiaj, *Rákóczi, Kossuth, Károlyi* kaj la aliaj... Post la granda oktobra revolucio, en la interna milito la sovetaj popoloj ricevis decidan subtenon fare de la *hungara centmilo* da ruĝarmeanoj en spirito de l'internaciismo (estu fiere menciata: *inter ili multaj esperantistoj!).* Post kvaronjarcento tiu hungara helpo estis jam triumfe reciprokita!

De tiam datiĝas la *grandega salto* en la hungara historio: plena bankroto de la postfeŭda sistemo, aliformiĝo de la socio, de la subevoluinta ekonomio, disvolvo de la demokratia potenco de laboristoj, kamparanoj, intelektuloj. Kiel ajn iu emas taksi tiun ĉi jarcent-trionon, pro inklinoj aŭ interesoj, restas nekontestebla la eksterordinara graveco de la aliformiĝo! Vasta *industrio,* kiu produktas dekoble pli ol antaŭ la milito. Moderna *agrikulturo,* kiu per duono da laborantoj la duoblon produktas. Jen la ŝlosilo al la multajn surprizanta landa prospero, al la grave altiĝinta ĝenerala vivnivelo, sekve de kio oni delonge ne konas la senlaborecon, tiun teruran drakon de... pli riĉaj landoj. Kompare al tiuj, la ekonomia postrestinteco plejparte likvidiĝis jam; la situacio eĉ turniĝis rilate la *socialajn prizorgojn* pri infanoj, patrinoj, sanitaro k. a., *avangarde*



Vico da homoj atendas la pramon ĉe Budapeŝto, kiu ne havis pontojn en printempo de 1945

en la mondo. Tamen: perfekteco *ne* ekzistas.

Grava sperto estas, ke dum rapide moderniĝintaj cirkonstancoj, homoj ŝanĝiĝas ofte ne tiom rapide. Tiaspecaj ekkonoj ebligas ĝustigi iluziojn, likvidi erarojn kaj difektojn, kiuj troviĝas abunde: la pasinto ankoraŭ lasis siajn fingrojn en nia nuno, kaj laŭregule, sed diversmaniere tio prezentiĝas en ĉiu homa grupo.

Antaŭ 35 jaroj, post liberiĝo de sub la faŝismo ŝajnis plene ne kredeble, ke dum tiom mallonga periodo nia Mezorient-Eŭropa malgranda lando sukcesos sin levi el la marasmo kaj efike kunlabori kun niaj najbarlandoj, flanken ŝovi la iamajn ŝovinismajn konfliktojn. Oni apenaŭ povis tiutempe imagi la grandiozan kulturan prosperon — des malpli, kiom alte respektos la socialisme regata ŝtato la kulturon de la Internacia Lingvo. Nun jam videblas.

Ervin *Fenyvesi*

Menyhért Lengyel

LA MIRINDA MANDARENO

La suba novelo estas verŝajne iom konata por ĉiuj legantoj de nia revuo, ja ĝi servis kiel scenaro por la famiĝinta baleto de Béla Bartók. Ĝi aperis antaŭ pli ol sesdek jaroj, en 1917, sed ĝia vibranta stilo kaj tre karakteriza atmosfero faras ĝin leginda ankaŭ nuntempe. La aperigon motivas la fakto, ke Menyhért Lengyel naskiĝis antaŭ cent jaroj — cetere atinginte tre altan aĝon, li mortis nur en 1974. La fotoj. prenitaj el la baleto, celas helpi la pli intensan perceptadon de la „mirinda" mondo de tiu ĉi majstronovelo.

Rolantoj: *Mimi — La maljuna kavaliro — La liceano — La mandareno — Unua, dua kaj tria vaguloj*

Ĉambro en etaĝo — kun fantaziaj koloroj de l' mizero. Ĉifoniĝintaj tapetoj — nudaj muroj. Komike kadukiĝintaj mebloj — en la angulo aĵoj — senmotivaj objektoj — kiel en malprestiĝa antikvaĵejo. Koncize: la ĉambro estas hejmo de tri vaguloj, kiuj ĉi tie deponas la ŝtelitaĵojn. En la fono pordo — dekstre kaj maldekstre de ĝi fenestroj. El malproksima helo, el la vibranta lumo de l' lampoj, el la strangaj kaj konfuzaj krioj ĵetiĝas en la ĉambron la vivo kaj bruoj de grandega urbo.

1

Mimi kaj la tri vaguloj. La unua kuŝas etendiĝante sur la lito, la dua kverelas kun Mimi meze de l' ĉambro. Mankas mono. Li tiras eksteren siajn poŝojn — ili estas malplenaj. La tria kun granda fervoro traserĉas la tirkestojn de l' tablo kaj ŝranko — li trovas nenion. Ankaŭ li turnas sin kontraŭ la knabino. Mimi levadas la ŝultrojn. Kial ili insultas ŝin? Kion ili volas de ŝi? Ne ŝi kaŭzis tion. Ŝi ne povas helpi.

Tiam la unua sur la lito eksidas. Li estas granda, morn-vizaĝa, sentima, brutala junulo. Li alpaŝas al Mimi. Ekkaptas la brakon de l' knabino — tiras ŝin antaŭ sin. „Mankas mono? — akiru!" — Mimi ektimante senkulpigas sin: kion mi faru? La vagulo: staru ĉe la fenestro — montradu vin — logu iun veni supren — kaj ni triope lin traktos kiel necesas.

La aliaj du aprobe kapbalancas. Mimi montras malemon. Pugnoj aperas antaŭ ŝia vizaĝo. La unua vagulo brutale puŝas ŝin al la fenestro. Poste la triopo rapide intertraktas: ili kaŝos sin, unu sub la tablo, la alia malantaŭ la ŝranko, kaj la tria apud la lito. Okazas tiel. Atendado.

2

Mimi staras antaŭ la fenestro. Si elrigardas — mansignas — okulumas — ridetas. Senrezulte. Sed foje ŝi ektremas. Mallerte ŝi rigardas malantaŭen. La tri vaguloj aperigas sian kapon: ĉu io? Mimi jese kapsignas. La triopo retiriĝas. Atendado. Sur la ligna ŝtuparo frapoj de malrapidaj paŝoj. Mimi retroiras ĝis la mezo de l' ĉambro — ĉiam rigardante le pordon, kiu malfermiĝas, kaj enpaŝas — la maljuna kavaliro.

Stranga maljunuleto, laca, sulkoplena vizaĝo, sed vaksitaj lipharoj, sur lia kapo foruzita cilindra ĉapelo, lia jako brilas pro la multfoja gladado — suspektindaj gamaŝoj, sur la piedoj ruinaĵo de lakita ŝuoparo, malpura kolumo, malmultekosta, vulgarkolora kravato, en la butontruo sekiĝinta floro.

Ridetante li enpaŝas — kun la aplombo de kavaliro — post kelkaj paŝoj haltas — observas la knabinon — li estas ravita. Deprenas la cilindran ĉapelon — metas ĝin sur la tablon (lian kranion kovras hararo, kombita komplike kaj kun pedanta zorgemo) kaj, paŝtante la rigardon sur la knabino, li komencas detiri siajn malpurajn gantojn. Mimi staras — atendas.

Nun la maljunulo alpaŝas ŝin, kaj disetendas la brakojn — volas ŝin ĉirkaŭbraki. Mimi retropaŝas — demande alrigardas lin, kaj per kunfrotado de l' dikfingro kaj montrofingro ŝi demandas: mono, ĉu?

La maljunulo ne volas rimarki la demandon — nova amema movo. — Mimi nun ripetas la demandon per mano ŝovita tuj sub lian nazon: mono, ĉu?

La maljunulo bagatelige mansignas — ridetas: mono — tio ne gravas. Amo estas ĉio. Li premas la manon sur la koron — amindumas plaĉivole movas sin — pinĉas brakon de l' knabino — kaj ŝian vangon, li fariĝas ĉiam pli im-

pertinenta — la indignanta Mimi apenaŭ povas forigi lin, kiam

la tri vaguloj aperas salte — atakas la maljunan kavaliron — ili formas kordonon inter la tablo kaj la pordo, ĵetas la maljunulon unu al la alia, ĝis tiu elflugas tra la pordo, ruliĝas malsupren, la cilindran ĉapelon ili ĵetas post lin — ankoraŭ aŭdeblas kiel la ĉapelo frapetiĝante malsuprenas sur la ŝtuparo.

En la ĉambro granda indigno. Ili mokas la maljunulon — imitas liajn amkonfesojn. La unua vagulo denove staras minace antaŭ la knabinon: estu pli lerta, mi diras! Li puŝas ŝin denove al la fenestro — kaj ili triope kaŝas sin. Mimi antaŭ la fenestro — la sama ludo, kiel pli frue — ŝi balancas sin plaĉeme — ĉiam fortiĝanta triviala muziko de l' sinproponado, kaj la sonoj abrupte fariĝas mildaj, teneraj kaj infanecaj, ĉar

3

Mimi ekvidas iun sur la strato. Ŝi elkliniĝas tra la fenestro. Mansignas. Ridetas. Poste ŝi turnas sin — ĝoje aplaŭdas — gaja, malpeza kuro sur la ligna ŝtuparo, la pordo frape malfermiĝas, kaj aperas: la liceano.

Rozaj vangoj, blondaj haroj, malstrikte nodita kravato — duonŝuoj — golfpantalono. Ĝis tie li kuregis — sed nun abrupte haltas — ne scias kion fari — anhelas — terure ruĝiĝas, kaj mallevas la okulojn.

Mimi ridetante rigardas lin: aminda knabo!

Ankaŭ la liceano ĵetas embarasitan rigardon al la knabino.

Mimi mansignas: venu proksimen.

La liceano time proksimiĝas.

Mimi: nu, venu, knabeto. Ŝi prenas lian manon: kiel delikata. Karesas liajn vangojn: kiel rozaj! La kapon: kiel blonda! Ŝi tiras lin pli proksimen, denove frapetas liajn vangojn: karuleto. Kaj kiel ĉarma kaj kiel pura — plezure ŝi rigardas lin — la liceano estas embarasita, mallerta, aminda.

Nun Mimi ekmemoras, ke la povruleto estas viktimo — necesas kontroli, ĉu li havas ion. Ŝi ĉirkaŭbrakas kaj rapide traserĉas lin — rigardas liajn manojn: li ne havas ringon — la veŝtopoŝon: nek horloĝon — traserĉas la poŝojn de l' jako — troviĝas nur poŝtuko — parfumita — ŝi flaras — forĵetas ĝin: nenio! Ĉagrenite: ĉu vi tute ne havas monon? La liceano malgaje kapneas. Li turnas sin senespere, deprimite, ŝi kompatas lin: povrulo! Nu, venu, karuleto — vi ne bezonas malĝoji. Ho, kiel juna, kaj kiel li tremas, kvazaŭ — venu —

ŝi ĉirkaŭbrakas, karesas, dorlotas lin, ŝerce tiras lian orelon, frapetas la vangojn, la mallertajn manojn de l' knabo plektas ĉirkaŭ sian talion, senbrue ili komencas valsi — la movoj fariĝas ĉiam pli liberaj — la vangoj koloriĝas, ĉiam pli fandiĝante — ili haltas, ridante rigardas unu al la alia — kiso —

sed tiam aperas salte la tri vaguloj, kiuj jam ĝis nun kolere rigardis la scenon — disigas ilin — la liceano kontraŭstaras — sed kiel li povus kontraŭ tri sovaĝaj uloj — kiuj elpuŝas lin tra la pordo. Li malaperas, sed sur la ŝtuparo — sur la korto kaj eĉ en la strata bruo ankoraŭ longe aŭdeblas lia malforta ploro.

En la ĉambro la junuloj turnas sin al Mimi, tre kolere. Mimi kompatas la knabeton — ploras. La vaguloj mokas ŝin: ŝi volas tiun — tiun nulon. Ŝi volas amon. Kaj ŝi eĉ kompatas — priploras lin.

La unua junulo elprenas sian tranĉilon, kaj minacas la knabinon: estu singarda — mi mortpikos vin! Se eĉ nun vi ne faros ion, se vi ne estos pli lerta — vi ne plu vivos! Ek al la fenestro!

Mimi tremante obeas. Li tri vaguloj denove kaŝas sin.

Ankoraŭ aŭdeblas la malforta plendo de l' ploranta infano, kaj kiam la virino plaĉeme koketas antaŭ la fenestro, denove la motivo de sinproponado, sopirveko, ĝi konstante pliiĝas, kaj abrupte ricevas spican, ekzotikan koloron —

4

Mimi ektremas ĉe l' fenestro — ŝi ektimis. Retropaŝas. La vaguloj aperigas la kapon: kio okazis? La knabino time kaj senkonsile staras en la mezo. La vaguloj persvadas, instigas ŝin: al la fenestro — al la



Mimi kaj la tri vaguloj
Gabriella Lakatos, István Kiss, Levente Sipeki, Zoltán Sallai

fenestro! Mimi time paŝas denove al la fenestro — la ekzotika muziko daŭre fortiĝas, la ŝtuparo krake-knaras, la knabino ĉiam rigardante la pordon, tremante retiriĝas ĝis la tablo — la pordo malfermiĝas, kaj sur la sojlo staras la mandareno.

Ĉino. Dikaj, flavaj vangoj — oblikvaj, rigide elstarantaj okuloj, kiuj eĉ ne ektremas, nur pike, rekte rigardas, kiel tiuj de fiŝo. Sur lia kapo silka ĉapo, el ĝi longa, nigra harplektaĵo falas ĝis la dorso. Riĉe, abunde brodita vasta, flava silkmantelo, nigra velurpantalono kaj tre delikataj botoj.

Ĉirkaŭ la kolo plurtavole volvita orĉeno. La butonoj de lia mantelo brilas, liajn delikatajn fingrojn kovras briliantoj.

Li staras sur la sojlo, kaj per sentreme rigidaj okuloj, seriozege rigardas la knabinon.

La knabino ektimas lin kaj retropaŝas. Sed kien ajn ŝi iras, al la tablo, ŝranko aŭ lito — la kaŝiĝintaj vaguloj ŝovas, puŝas ŝin al la mandareno. Fine ŝi decidiĝas, kaj singarde proksimiĝas al la mandareno, staranta sur la sojlo. Time ŝi vokas lin: venu proksimen. La mandareno ne moviĝas. Ankoraŭfoje ŝi vokas lin. La mandareno ekiras. Per egalmezuraj paŝoj, malrapide li venas ĝis la mezo de l' ĉambro. La knabino montras al seĝo: eksidu. La mandareno eksidas. Sed rigide kaj kontinue — seriozege kaj sen moveto eĉ de

Mimi kaj la maljuna kavaliro (G. Lakatos, Gyula Harangozó)

Mimi kaj la liceano (G. Lakatos, József Forgács)

vangmuskolo, li ĉiam rigardas la knabinon.

Fine necesas fari ion, kaj Mimi mallerte, tremetante komencas ludi. Ŝi preterŝvebas, preterdancas la mandarenon — plaĉeme proponas sin. Ĉirkaŭvalsas en la ĉambro, kaj kiam dumdance ŝi atingas la pordon — abrupte ŝi riglas ĝin — dancas plu. La mandareno rigardas ŝin — sen eĉ palpebrumeto — seriozege. Mimi dancas ĉiam pli rapide, ŝi estas jam pli kuraĝa, pli libera, kaj kiam ĉe turno ŝi estas antaŭ la mandareno, vidante la strangan rigidecon, senmovecon de l' ĉino — komencas ridegi — ĉiam pli laŭte kaj kapturne pro l' danco, fandiĝante en la ridego ŝi falas en la sinon de l' senmova mandareno.

Kaj dum la rideganta virino tie kuŝas, konvulsias, ondas antaŭ li, en la mandareno okazas malrapide ŝanĝoj tre strangaj. Eta tremo trakuras lian korpon, de la piedoj ĝis la verto. Liaj vangoj koloriĝas. La okuloj, ĝis nun rigide elstarantaj, ekvibras kaj ek de tiam pli kaj pli rapide palpebrumas. Lia brusto leviĝas — li komencas spiri peze kaj intermite. Liaj manoj bruske moviĝas kaj la fingroj en rapidiĝanta kuro ekvagas — al la kolo — al la kapo de l' knabino... Lia eksciteco daŭre pliiĝas. Etaj refleksaj movoj aperas ĉe li — lia korpo ektiriĝas — li frostotremas — kaj abrupte, pro l' varma ondo de l' sango, inundanta en li, komencas vibri lia tuta korpo. La knabino rigardas al li — ektimas lin — ŝia rido interrompiĝas — ŝi eksaltas — retroiras.

Ankaŭ la mandareno ekstaras. Li etendas la brakojn, kaj ekiras post la knabinon. La knabino fuĝas — post ŝi la mandareno — liaj okuloj rigide fiksiĝas al ŝi — lia vizaĝo estas tordita kaj peteganta, kiel tiu de malsana besto.

Komenciĝas persekutado... la knabino forŝvebas inter tablo kaj seĝoj — la mandareno post ŝi — li saltas — kaptas al la knabino — li falas... sur la planko prenas la maleolojn de l' kuranta knabino... ŝi liberigas sin — la mandareno eksaltas... lia senpoveco kaj mallerteco malpliiĝas — foriĝas — li ĉiam pli elastas — fariĝas senlime facilmova kaj timige burleska — nun jam estas li, kiu proponas sin, komencas danci per groteskaj movoj — kaj stranga, raŭka voĉo gluglas el lia gorĝo — la knabino ĉiam pli timas lin — ŝi fuĝas — la mandareno post ŝi — li tintigas sian monon, per avidaj movoj kaptas al la knabino — estas preskaŭ atinganta ŝin — la knabino elglitas — la mandareno ploregas, larmoj sin rulas amase sur lia vizaĝo, tute li perdas sinregon — giras, rotacias, kun ĉiam pli timiga rapideco, kiel ega turbo — farante venton ĉirkaŭ si — liaj flava mantelo kaj harplektaĵo flugas en la aero — ne eblas fuĝi de li — li kaptas la knabinon kaj kun terura, feliĉa stertorado li terenfalas kun si...

En tiu momento salte aperas la tri vaguloj. Ili ĵetas sin sur la mandarenon — senmovigas lin — liberigas la knabinon. Ili traserĉas la poŝojn de l' mandareno — la ormoneroj tinte disruliĝas sur la planko — ili deprenas la longan orĉenon de sur lia kolo, detiras la ringojn de sur liaj fingroj — ĉion ĉi kun neordinara rapideco — kaj kiam li estas prirabita, la rigardo de la triopo renkontiĝas, kaj ili jam decidis: mortigi lin. Ili prenas lin kiel pakaĵon kaj ĵetas sur la liton; kusenojn, plumonon, matracon, ĉifonojn, ĉion ili ĵetas sur lin, kaj ĉiuj tri premas la multajn kovrilojn strikte sur lin, por ke li sufokiĝu. Paŭzo. Poste ili mansignas unu al la alia: fino. La knabino staras ĉe l' tablo, frostotremas. Mallonga atendado. La vaguloj malpeziĝante ekspiras. Li mortis.

Kaj tiam la pala, flava kapo de l' mandareno aperas el sub la kovriloj.

Kapo — kun rigide elstarantaj okuloj — rigardantaj la knabinon.

La tri vaguloj konsterniĝas. La mandareno ne mortis. Ili rekolektas siajn fortojn: ni murdu lin.

Ili forĵetas la kovrilojn de sur la lito — kaj malsuprenigas la mandarenon. Kiam la piedoj de l' ĉino atingas la plankon, li eksaltas — kiel fantazia pilko, kaj ĵetas sin sur la knabinon.

Ili kaptas lin — antaŭ ol li atingus ŝin. Ili tordas liajn brakojn malantaŭ la dorson — tenas lin firme. La mandareno — kvazaŭ tute ne interesus lin, kio okazas al li, kion ili faras al li — li nur rigardas la knabinon — per rigidaj okuloj. Du torĉoj en infera interna fajro.

La tria vagulo elprenas longan, sangmakulitan, rustoplenan tran-

Mimi kaj la mandareno (Vera Szumrák kaj Ferenc Havas)

La morto de la mandareno (V. Szumrák kaj Viktor Róna)

ĉilon. Mansignas al la aliaj du, ke ili tenu forte la ĉinon. Kaj kun la longa tranĉilo li kure puŝiĝas kontraŭ la mandareno.

Li ŝovas la tranĉilon ĝis la tenilo en la ventron de l' mandareno.

La haŭto fendiĝas — la korpo ekĝemas — la pinto de l' tranĉilo aperas sur la dorso de l' mandareno.

Ili ellasas lin. Li falas, por poste renversiĝi — nun li mortas.

La mandareno ŝanceliĝas — pendas — balanciĝas dum minuto — jam preskaŭ renversiĝas — (ili atente rigardas lin) — li abrupte reakiras la ekvilibron — eksaltas — al la knabino.

Ŝi fuĝas ŝrikante.

La vaguloj denove senmovigas lin. Ankaŭ ili ektimis — teruriĝis — ĝuste tial necesas rapide likvidi lin.

Unu el ili elprenas grandan, malnovstilan pistolon. Li celas la kapon de l' mandareno — malŝargas la pistolon. Krakego. Fumo. La vaguloj forsaltas de antaŭ la mandareno. La fumo disiĝas. Sur la frunto de l' mandareno malhela, bruletinta makulo — tie la kuglo trapasis ĝin. Li ŝanceliĝas — balanciĝas — poste svingiĝas, kaj denove al la knabino.

Kun groteskaj saltoj li komencas persekuti ŝin.

Ili kaptas lin. Senmovigas lin.

Kion fari?

Mortigi lin — mortigi — mortigi!

Sed kiel?

Unu el ili montras al la lustro.

Ili pendigos lin sur ĝi.

Ili starigas lin sur seĝon. Lian harplektajon ili volvas ĉirkaŭ la kolon. Kaj tiam unu el la vaguloj — starante sur la tablo — per la harplektaĵo pendigas la mandarenon sur la lustro. Ili piede forpuŝas la seĝon de sub li. La mandareno estas pendigita.

La lustro estingiĝas.

Mallumo.

Silento.

La tri vaguloj kaj la knabino kunpremiĝante silentas en la mallumo.

Kaj abrupte stranga pala lumo supre.

La ronda ventro de l' mandareno, kiel tiu de dio Budho, kiel fantazia globo en la aero — komencas lumi.

Kaj la mistika lumo prilumas la tutan figuron, pendigitan per la harplektaĵo — liajn grandan, flavan, rondan kapon kaj rigidajn okulojn, kiuj kun obstina besta rigardo, terura sopiro lumas al la knabino, kiel du elektraj reflektoroj.

La vaguloj frostotremante, timegante serĉas rifuĝon — ili fuĝas, rampas sub la liton, kaŝas sin.

La knabino restis meze de l' ĉambro.

Ŝi rigardas al la mandareno.

Nun la unuan fojon — kuraĝe — kaj ridetas.

Ŝi mansignas al unu vagulo: venu ĉi tien. Kaj kiam tiu ne volas veni, ŝi iras al li, eltiras lin el la kaŝejo: detranĉu por mi tiun mandarenon.

La junulo ne kuraĝas tuŝi lin.

La knabino pli energie instigas lin, donas la tranĉilon en lian manon: mi volas!

La junulo tremante grimpas sur la tablon, kaj per la tranĉilo tranĉas la harplektaĵon.

La mandareno falas sur la plankon.

Sed denove li eksaltas — kaj al la knabino.

La knabino prenas lin per la brakoj. Ĉirkaŭbrakas lin, longe prenas lin al si.

La mandareno aŭdigas longan stertoron de feliĉa plenumiĝo. Li glue premiĝas al la knabino, tremo inundas lian tutan korpon.

Tiam la vundo sur la ventro, kaj la truo sur la kapo silente komencas sangi.

Li svenas ĉiam pli — liaj brakoj, per kiuj li prenis la knabinon, malstreĉiĝas, liaj kruroj fleksiĝas.

Liaj okuloj ankoraŭ rigide — feliĉe — rigardas la knabinon, sed malrapide ili fermiĝas . . .

Lia tordita vizaĝo ridetas.

La sopiro estingiĝis.

La knabino malrapide, triumfe, ridetante delasas lin sur la plankon — ĉe sonoj de stranga, raŭka, ekzotika muziko

la mandareno mortis.

El la hungara: *Vilmos Benczik*

Ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

14. La unua mondmilito kaj la 1918-19-jara revolucio*

**„Pacon, rajton, panon!"
— manifestacio de senlaborulinoj**

Hungario, membroŝtato de la Aŭstra-Hungara Monarkio, partoprenis la unuan mondmiliton aliance de la t.n. „centraj potencoj". En la bataloj la Monarkio donis multan sangoferon. En la tri unuaj jaroj de la milito mortis du milionoj da homoj, inter ili ĉ. 700 mil hungaroj. Malatundis nutraĵoj, la inflacio kreskis, la prezoj altiĝis multe pli rapide ol la salajroj; aliflanke, la posedantoj de la pormilitaj industrioj enpoŝigis grandegan profiton. Rapidpaŝe kreskis la malkontento de la amasoj.

Grafo Mihály Károlyi, elstara persono de la hungara politika opozicio, jam en 1915 postulis rompi la aliancon kun la germanoj kaj subskribi apartan packontrakton. Li fondis partion, proklamantan urĝan pacon kaj demokratiajn sociajn reformojn. Post la morto de Francisko Jozefo estis surtronigita Karlo la 4-a (1916—1918), kiu iniciatis liberalajn reformojn, kaj la plibonigon de la situacio de naciaj malplimultoj. Krom tio, li intencis realigi la apartan packontrakton, sed liaj planoj malsukcesis en 1917. Dume tutlande pliiĝis la malkontento kaj okazis aro de strikoj, al kiuj donis stimulon la februara revolucio en Ruslando. Ene de la socialdemokratia partio, fortiĝis la maldekstra opozicio. Laŭ la aktivado de la Galilei-Rondo — revolucia, socialisma grupo — komenciĝis kontraŭmilita organiziĝo, kiu kontaktis ankaŭ la sindikatajn laboristojn. La Granda Oktobra Socialisma Revolucio kaj la pacdekreto de la Sovetia registaro efike influis la hungaran socian evoluadon. La naciaj registaroj, sekvantaj unu la alian, ne kapablis solvi la ĉiam kreskantan politikan streĉiĝon, la problemon de la strikoj. La revoluciaj movadoj, celantaj nacian aŭtonomion kaj memstariĝon de la naciaj minoritatoj, atingis jam eĉ la militan fronton.

Somere de 1918 evidentiĝis, ke la sorto de la Aŭstra-Hungara Monarkio estas decidita. Jam antaŭ ol la Monarkio demetus la armilojn (la 3-an de novembro 1918), formiĝis la Nacia Konsilio estrita de M. Károlyi. Ĉi tiu registaro celis en sia programo apartan packontrakton, sendependecon, rekonon de la rajto de la nacio pri aŭtonomio, agraran reformon kaj ĝeneralajn elektojn. La 31-an de oktobro okazis granda manifestacio: la

Fandotaj, malmuntitaj sonorilegoj en la fervojstacio

**Venkis la revolucio!
— la 31-a de oktobro, 1918**



Soldatoj portantaj la simbolan floron de la revolucio, la „aŭtunan rozon"

de la hungara popolo

La unua centra komitato de la Hungarlanda Partio de Komunistoj

La 7-an de decembro 1918 aperis la unuan fojon la centra organo de la nova partio. Ĝia unua numero

VÖRÖS UJSÁG

KOMMUNISTA LAP.

OSZTÁLYHARCOT!

amasoj okupis la strategiajn punktojn de la ĉefurbo. Grafo Károlyi estis designita por esti prezidanto de la ministraro. Károlyi elformis koalician registaron, en kiu partoprenis tri partioj: tiu de Károlyi, la Socialdemokratia kaj la Radikalisma.

La registaro, transpreninta la potencon dank' al la t.n. „revolucio de la aŭtunaj rozoj", volis enkonduki nur porkapitalismajn reformojn. La popolamasoj, malkontentaj pri tio, la 16-an de novembro 1918 proklamigis la respublikon. Sekve de tio, laboristoj, soldatoj kaj kampuloj fondis, unu post alia, siajn konsiliojn, strebantajn por tio, ke la potencon transprenu la popolo. La registaro klopodis malhelpi la revolucian organiziĝon.

Inter tiuj cirkonstancoj okazis, ke la 24-an de novembro 1918 fondiĝis la Hungara Komunisma Partio. Ĝiaj fondintoj estis militkaptitoj-komunistoj revenantaj de Ruslando, ĉekape kun Béla Kun; krome, maldekstraj socialdemokratoj kaj revoluciemaj socialistoj.

Aŭtune kaj vintre de la sama jaro, la laboristaj kaj soldataj konsilioj fariĝis ĉiam pli radikalismaj; aliflanke, sur la registaron peziĝis ankaŭ intensa dekstra premo. En tia situacio, la registaro devis abdiki — Mihály Károlyi estis nomata prezidanto de la respubliko. Ene de la nova registaro fortiĝis la influo de la dekstraj socialdemokratoj. Denove sekvis strikoj kaj manifestacioj; estis liberigitaj el la prizonoj la kommunismaj gvidantoj, kaj proklamita la proletardiktaturo.

En tia politika situacio Entento, kiu eĉ post la fino de la milito lasis siajn trupojn en Hungario, anoncis, ke ĝi okupas novajn teritoriojn de la lando. La registaro abdikis, kaj la



Mihály Károlyi, prezidanto de la respubliko

Socialdemokratia Partio — en ĉi tiu, ekstreme streĉa situacio — decidiĝis por interkonsento kun la komunistoj, unuigonte la du partiojn, cele de transpreni la regadon kaj proklami la Hungarlandan Konsilian Respublikon.

La 21-an de marto 1919 fondiĝis la unua proleta registaro de Hungarlando, kaj estis proklamita la Hungarlanda Konsilia Respubliko.

Tradukis. *VHZS*

*Pri tiuj historiaj eventoj kaj la persono de M. Károlyi pli detale oni povas legi en la n-roj 1975/3, 1978/5

La 16-a de novembro 1918 — proklamo de la respubliko

István Torda

Jarcentoj de la hungara literaturo

6. Du popolaj poetoj

Se iu Hungarlande aŭdas la vorton „poeto", ekpensas pri Sándor Petőfi. Unu tutan jarcenton mankas literatura skolo, kiu estus povinta formiĝi sen koncepti la propran opinion pri Petőfi. Li faris grandan vojon ne nur en la propra patrujo, sed ankaŭ trans ĝiaj limoj. La poeto, kiu dumvive nur unu solan fojon, kiel soldato de la imperiestra armeo, povis esti eksterlande, post la morto per siaj poemoj tradukitaj en preskaŭ kvindek lingvojn povis atingi praktike ĉiun angulon de la mondo. En la nomaro de la granduloj de la 19-jarcenta literaturo brilas ankaŭ lia nomo.

Revolucio de la poezio

Petőfi naskiĝis la 1-an de januaro 1823 en la urbeto Kiskőrös. Lia patro estis buĉisto, István Petrovics, la patrino Mária Hrúz, kiu antaŭ la edziniĝo laboris kiel servistino kaj lavistino. Printempe de la jaro 1838 la ekonomia situacio de la gepatroj grave malboniĝis. La juna Sándor tiutempe estis liceano en Selmecbánya kaj entuziasma aktivulo de la loka literatura societo amatora. Li tiam fervore vizitadis la spektaklojn de teatra trupo, vizitanta la urbon kaj ne bedaŭris eĉ se la profesoroj lian atestilon malbonigas ĝis klasifikaĵoj nekontentigaj. La patro tiam ĉesigis la patronadon super li kaj la adoleskulo staras unusola en la norda parto de la lando kun du siaj versaĵoj, akirintaj protokolitajn laŭdojn. Li iras al la urbo Pest por esti epizodisto en la Nacia Teatro. Li baldaŭ lasas la teatron kaj en 1839 li volontule fariĝas soldato en infanteria regimento. La regimento piediras al Graz kaj la malfortsana poeto malsaniĝas. Per la helpo de bonkora soldatkuracisto en la komenco de 1841 li estas forlasita el la armeo. En multaj poemoj li poste rememoris pri tiu periodo de sia vivo.

Post la civiliĝo li senpacience vagadas en la lando. En la jaro 1841 en la revuo *Athenaeum* aperas lia poemo. En la sekvaj du jaroj Petőfi verkas tutan aron de grandsignifaj poeziaĵoj, sed la vojo ĝis la apero de lia unua volumo estas ege malfacila. La vintron de la jaroj 1843—1844 li pasigas en la urbo Debrecen. Ĉi tie li kolektas en unu kajero siajn poemojn, verkitajn ĝis tiu tempo, kaj en februaro de 1844 li perpiede ekiras al Pest. En la ĉefurbo patriota societo, la t. n. Nacia Rondo laŭ propono de Mihály Vörösmarty entreprenas la eldonon de la Petőfi-poemoj, samtempe li estas invitita esti vicredaktoro ĉe la revuo *Pesti Divatlap* (Peŝta Modrevuo).

Tiutempe Petőfi ne estas ankoraŭ konscia revoluciulo, sed jam li estas ribelulo, atakanta la sobran mezkvalitecon. Li volas samrajtecon por la popoleca stilo, samtempe li postulas rajton en la literaturo por temoj kaj figuroj popolaj.

En la dua parto de 1844 li verkas du epikajn ĉefverkojn. Komikan epopeon sub la titolo *La Martelo de la Vilaĝo* kaj fabel-eposon *Johano la Brava.* La unua verko rakontas per epopeaj rimedoj pri drinkeja interbatado. Ĝi ne estas nura stilparodio, sed ankaŭ satira kritiko de tuta stiltendenco. *Johano la Brava* estas popola eposo. En ĝi multobliĝante aperas ĉio, per kio la popolo pliriĉigas la literaturon: la popola vivo, la efiko de popolkantoj, la esprimivo de la popola lingvaĵo kaj la varieco de la popolaj fabeloj.

La konservema kritiko tuj eksentas la novecojn forman kaj enhavan, kaj ĝi komencas militiron kontraŭ Petőfi.

Poezio de la revolucio

La nemkonscio de Petőfi kiel poeto fortikiĝas en la fajro de atakoj kaj kontraŭatakoj. En lia pensado pli kaj pli proksimiĝas la ideoj de la nacia sendependenco kaj tiuj de la demokratismo socia. En 1845 — sub la influo de pluraj malfeliĉaj amoj — por iom da tempo en lia liriko ekregas pesimismo.

Post tiu periodo antaŭ ni staras poeto kun revolucia-demokratisma idearo. Parolante pri lia mondpercepto, ni devas konstati, ke ĝi multe ricevis el la ideoj de la socialistoj-utopiuloj. Tiutempe ja la pensoj de Saint-Simon, Fourièr kaj Owen abunde estis interpretitaj ankaŭ en la Hungarlanda gazetaro. Memuaroj de samtempanoj inter la legaĵoj de Petőfi nomas verkojn de Lamartine, Michele, Blanc, Sue, Hugo, Béranger. Pri kelkaj el ili ankaŭ Petőfi mencias, same kiel pri George Sand, kies verkaro kaj vivo kunfandiĝis kun la fruaj socialismaj tendencoj.

En marto de 1846 Petőfi organizas la Dekmembran Societon, klubon de junaj verkistoj, apiniantaj same pri la plej gravaj sociaj problemoj. En septembro de la sama jaro li konatiĝas kun Júlia Szendrei, kiun li post unu jaro edzinigas. En la poemoj, verkitaj al ŝi, nedisigeble kunfandiĝas la du pasioj de la poeto: la politiko kaj la amo. La sekva tempo — inter 1847 kaj 1849 — estas disvolviĝo de la poeto-revoluciulo kaj tiu de la poeto-liberbatalanto, kiu reagas al ĉiu historia evento.

La 15-an de marto 1848 sub la influo de la Vienaj revoluciaj eventoj ekmoviĝas ankaŭ la Peŝtaj amasoj. Antaŭ ili iras Petőfi kune kun siaj kamaradoj, al kiuj li verkis sian *Nacian Kanton,* la hungaran Marseillaise-on. En aŭgusto, kiam la kroata armeo kune kun serbaj volontuloj, incititaj de la imperiestra Korto, minacas la ĉefurbon, Petőfi verkas grandiozan romantikisman epopeon. *La Apostolo* prikantas la sorton de radikala revoluciulo, respublikano, alveninta tro frue.

La eventoj de septembro pravigas la poeton: *„Ribelis muĝe maro,*



János Arany

/ *La maro de l' popol'!*" Post la aŭtunaj venkoj sekvas fiaskoj, poste venas la printempaj triumfoj. La poezio de Petőfi fariĝas konscienco de la nacio, batalanta por sia ekzisto. Li verkas ĝenrajn bildojn pri la soldatoj de la liberbatalo, ribeligajn poemojn kontraŭ la suverenoj kaj krome grandefikajn batalkantojn. Li mem estas majoro de la revolucia armeo flanke de ĝia pola generalo József Bem, la saĝa estro de la trupoj en Transilvanio.

Petőfi mortas la 31-an de julio 1849, en Transilvanio, malmulte antaŭ la fiasko de la liberbatalo. Li estis mortigita de kozako el la ekspedicia armeo de la Ruslanda Imperio.

Alia popola poeto

Laŭ hungara kritikisto de la 19-a jarcento, Pál Gyulai: „La junaĝon de Arany [Aranj] anstataŭas tiu de Petőfi, la maturecon de la lasta, tiu de Arany." La ideo estas sprita, sed nur parte vera, ĉar János Arany ne estas iuspeca pli matura Petőfi, sed — kvankam ili havas multajn similajn trajtojn — li estas poeto tute alispeca. Li alportis al la hungara poezio post la entuziasma kaj vastskala liriko fare de Petőfi, intiman vorton de la suferado de homo, kiu en si kaj por si mem rakontas pri la propra vivo. Lia poezio estas miraklo de la kunfandiĝo de la popola kaj la alta kulturoj. Neniu el la hungaraj poetoj prenis tiom de la popolo — lingve, esprime, vidmaniere —, kiom li. Kaj ĉion ĉi li kunigis kun la elementoj de la malnova hugara lingvo, kun la ekzemploj de la mondliteraturo.

Li naskiĝis en 1817. Li venis el etnobela familio, falinta en la staton de servutuloj. Li komencis lerni en sia naskiĝloko Nagyszalonta (nun *Salonta* en Rumanio), poste li iris por lerni al Debrecen, sed post aventuro en trupo de aktorojvaguloj, li reiras al la gepatroj. Li fariĝas notario de la eturbo. En 1845 li sendas al la konkurso de la literatura Societo Kisfaludy sian brilegan eposon satiran *La Perdita Konstitucio,* kiu prikantas la interbatalojn de la departementaj liberaluloj kaj konservemuloj.

Al la sekvajara konkurso de la sama societo li sendas sian unuan ĉefverkon, titolitan *Toldi.* Tiu ĉi popoleca epopeo fariĝis grava stacio en la evoluo de la tuta hungara literaturo. La temo de la verko estas: kiel atingas la reĝan korton Miklós Toldi, la fortega nobela junulo de la 14-a jarcento, vivanta en la kampula stato, kaj kiaj aventuroj okazas kun li. Temas fakte pri la antaŭlonge atendita leviĝo de la popolo. Tio estas popolfabela venko, rakontita en historiaj kadroj. Arany atingis tion, kio ŝajnis malebla: li povis doni psikologie profundan montron per naivaj popolepopeaj rimedoj. *Toldi* akiras por li la amikecon de Petőfi kaj la hungara literaturo al tiu amikeco ŝuldas klasike belan korespondadon de du poetoj.

Arany en 1848 verkas alian epopeon. Ĝia titolo estas *La Vespero de Toldi.* En la figuro de la maljuna heroo li per mirinda tenero montras la finon de la kavalirepoko.

1850 ankaŭ por la poeto estas komenco de profunda krizo mondkoncepta. La afero de la revolucio fiaskis, la granda kolego kaj amiko, Sándor Petőfi mortis. János Arany entreprenas profesoran laboron en la gimnazio de Nagykőrös, kaj kiel poeto li devas daŭrigi la atingojn de la poezia revolucio far Petőfi. Lia interna lukto naskas altnivelan lirikon intelektan. Plej bone karakterizas la vojserĉadon kaj modernecan geniecon de la poeto, restinta sola, la unua kanto de lia nefinita versromano *Steĉjo la Freneza.* Ĝi estas poezio de



Sándor Petőfi

sencele disipita krea forto. En tiu ĉi periodo naskiĝas ankaŭ brilega vico de histori-temaj baladoj kaj kelke da bonegaj studoj.

Arany en la mezo de la sesdekaj jaroj transloĝiĝas al Pest, iom poste li fariĝas ĉefsekretario de la Hungara Scienca Akademio. La poeto, baraktanta kun siaj problemoj, plena je skrupuloj, post la apero de epopeo *La Morto de Buda* eksilentas. La eposon li faris kiel komencan parton de hun-tema epos-triologio, kiun li neniam finverkis.

La lokon de la poeto Arany okupas Arany, la tradukisto. En tiu tempo, krom kelkaj eminentaj studoj, li eldonas siajn nesupereblajn Shakespeare-tradukojn (Somermeznokta Sonĝo, Hamleto). Li komencas ankaŭ traduki ĉiun komedion de la greka Aristofano.

Nur post la paso de dekdu jaroj Arany denove ekverkas poezie. Li finas la mezan parton de sia Toldi-trilogio sub la titolo *La Amo de Toldi,* kaj atingas la pinton de sia liriko en la poeziaĵoj nomitaj *Őszikék* (Aŭtunaĵetoj). En ili li preparas la vojon por la moderna subjektiveca liriko. Al la tonoj de la azilserĉado, de la rompo kun la socio aliĝas milda ironio al li mem, kiel ŝercema kvereleto kun homo, kiu eksmodiĝis, fariĝis anakronisma. En la lastaj jaroj naskiĝis liaj malfruaj baladoj, ili estas vizioj, kreitaj per grandiozaj konscio, drameco, muzikeco.

Li mortis en la jaro 1882.

Tradukis *P. A. R.*

Memore pri du revolucioj

133 tagoj. Historia skizo de Hungarlanda proletara revolucio. Dua eldono. Kompilita el elektitaj artikoloj de gvidantoj kaj aktivuloj de Hungaria proletara revolucio. Budapest, 1979. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio. 229 p. plus 7 fotopaĝoj. 19 cm. Prezo: 12,— ned. gld. (Por Hungario: 45,— forintoj.)

Nuntempe oni malofte trovas sufiĉajn informojn pri la internacia kooperativa eldonejo EKRELO (Leipzig—Moskvo), nur disajn menciojn tie kaj tie oni trafas, trarigardante la malnovan Esperantan gazetaron. Tamen, dum sia mallonga ekzisto en 1930—1933 la eldonejo ŝajnis prosperi, aperiginte ĉ. 60 librojn, kun la strebado, ke duono de la tutmonda esperantlingva literaturo estu proletaj eldonaĵoj de EKRELO. Impona tasko estis la jam preparita eldono de elektitaj verkoj de V. I. Lenin en 16 volumoj (laŭplane ĉiu volumo enhavus po pli ol 350 paĝojn). Vere ĝi estis promesplena eldonejo (vidu en HV 1976/4, p. 1—2), kies libron „133 tagoj de Sovet-Hungario" nun represis HEA, tiamaniere honorante la 60-an datrevenon de du interligitaj proletaj revolucioj — de la rusa (1917) kaj de la hungara (1919). Ankaŭ signifoplena estas la fakto, ke siatempe la libro naskiĝis kiel komuna laboro de sovetiaj kaj hungaraj komunistaj esperantistoj — jen, sekvinda ekzemplo el la jaro 1930.

„133 tagoj" estis tiu libro, per kies titolo oni regule komencadis la unuajn eldonlistojn de la novnaskita EKRELO, aperintajn en la Sovetia Esperanto-gazetaro. Jen, kion oni povis legi pri la kolekto tiam: „Unika verko en ruĝa Esperantio", „Verko de granda histori-teoria valoro" ... — kaj tio ne estis supertaksado. Ankaŭ nun ne estas. Ĉar alia ne povas esti antologio de artikoloj el la plumo de gvidantoj kaj aktivuloj de la Hungarlanda Konsilantara Respubliko, t.e. Sovet-Hungario. La gvidantoj de Sovet-Hungario penadis establi kaj garantii konstantajn, senperajn kontaktojn kun Lenin. La klopodoj fakte estis reciprokaj, de la komenco ĝis la subpremo de Sovet-Hungario. La idea kaj spirita unueco inter la gvidantoj de ambaŭ unuaj proletaj ŝtatoj estis kompleta. Estis do tute natura afero malfermi la artikolaron per „Saluto al la Hungara Laboristaro" de V. I. Lenin. Jen la nomoj de aliaj aŭtoroj: Béla Kun, Béla Szántó, Jenő Landler, György Lukács k.a. Ĉiu artikolo tuŝas speciale iun apartan flankon de la vastega problemaro de la hungara proleta ŝtato, sed oni trovas ankaŭ ĝeneralan antaŭhistorion, ekde 1848/49, kaj skizojn pri la postrevolucia sorto de la hungara elmigrintaro kaj de la laborista movado. Troviĝas ankaŭ kelkaj belaj literaturaĵoj.

Fine ni komparu iom la eldonon de 1930 kun tiu de 1979. La nuna eldono ne estas nura represo, ĉar krom la aparta nova antaŭparolo oni aldonis ankaŭ ĵusverkitan artikolon pri la Esperantomovado, kio estis bonega ideo. Oni penis iom korekti la malnovajn tekstojn ankaŭ lingve — kaj tio plej bone atestas la evoluon de la Internacia Lingvo: eĉ post la korektado kelkloke restis formoj strangaj kaj eĉ nekompreneblaj. Speciale multaj dubindaĵoj estas en la interpunkcio.

Tamen, la tutaĵo estas interesa kaj informplena, alportanta la etoson de la epoko, kaj ties manierojn kaj emociojn — kaj samtempe ĝi estas legaĵo unuavice por certagrade preparitaj legantoj, kiuj emas profundiĝi en historiaj kaj socipolitikaj aferoj ankaŭ teorie. Sed por tiuj ĝi estas valorega fonto de informoj. En Sovetio la nombro de tiaj legantoj nepre baldaŭ altiĝos lige kun la fondiĝo de ASE. La libro trovos legantojn en la tuta mondo, ĉar spertaj kaj specifaj trajtoj de la Hungarlanda Konsilantara Respubliko, sekvinta la unua la „rusan ekzemplon" de 1917, konsistigas nedisigeblan parton de la revolucia proletara sperto tutmonda, kaj havas instruan valoron por la nuntempaj revoluciuloj. La sento, kiun oni havas post la tralego de la libro, estas tiu de optimisma tragedio (precipe tragikaj estas la paĝoj pri la blanka teroro), kaj ferminte la libron, oni volus diri: „La Respubliko mortis — vivu la Respubliko!" Aŭ oni ekcitas el la poemo „133 tagoj", kies aŭtoro estas „Neniu":

133 tagoj,
Vi pasis jam for,
Sed vivas eterne
En proleta kor'.

Viktor *Goñŝtejn*

Donaco el Japanio

Hungara Esperanto-Asocio ricevis belan donacon el Japanio: dek ekzemplerojn de la pli ol 300-paĝa, grandformata, animskua libro *Hirošima—Nagasaki. Bilda Dokumentaro pri la Atombombado.* La donacon transdonis al ni reprezentantoj de Japana Esperanto-Instituto en Lucerno, dum la pasintjara UK.

Tiu ĉi teknike luksa libro eldoniĝis por informi la mondon pri la terureco de la atombombado antaŭ 35 jaroj, kaj ankaŭ pri la doloraj postsekvoj: pri la amaso da *hibakŝoj* (atombombitoj), kiuj vivas vivon kripligitan. Tre bonvena estas tiu ĉi averto nun, kiam la mondo devas decidi, ĉu ĝi pluiros sur la vojo de la armkonkurado, aŭ finfine ĝi decidos raciiĝi kaj daŭrigi la strebojn por malarmado.

La libron akompanas flugfolio, kiu informas, ke japanaj esperantistoj kontribuis mone ne nur por la produktokostoj de la libro, sed ankaŭ por senpaga distribuado de certa kvanto da libroj al eksterlandaj esperantistoj. Jen, citaĵo el la teksto de la flugfolio:

Kara Samidean(in)o!
La libro, kiun vi jen ricevas, venas al vi kiel amika meŝago, kiu kunportas la ardan deziron de la japana popolo al PACO.
Vi ĝin foliumos, kaj sur ĉiu paĝo vi trovos korfrapan kruelaĵon, de ĉiu bildo vi aŭdos agonian krion el la Infero.
Kiel ajn ŝoka estas por vi la libro, tamen, ni kore petas, ke vi NE FERMU viajn okulojn antaŭ ĝi: Ĝi estis ja realo — realo okazinta al vivantaj homoj antaŭ 34 jaroj; realo, kiu ankoraŭ nun daŭre turmentas viajn homfratojn; kaj realo, KIU EVENTUALE POVOS OKAZI ANKAŬ AL VI!

Hungara Esperanto-Asocio en publika kunsido transdonis la dek librojn al tiuj hungaraj esperantistoj, kiuj plej aktive partoprenis en la porpaca agado.

V. B.



Profesoro Paul Ariste

Aleksandr Ĥarkovskij

Kiu scias dekojn da lingvoj

Tiun ĉi artikolon afable disponigis al ni Gazetara Agentejo Novosti (APN).

Pri tiu ĉi homo en Estonio iras legendoj. Onidire, ne ekzistas sur la Tero lingvo, kiun Paul *Ariste* ne povus paroli.

Profesoro Ariste estras la Katedron de Finno-ugraj Lingvoj de la Tartua Universitato. Nomo kaj verkoj de tiu ĉi sciencisto, kiu en tiu ĉi jaro iĝos 75-jara, vaste konatas ekster la limoj de lia patrio. Ariste estas ano de la Akademio de la Estona SSR, honora doktoro de la Szeged-a universitato, honora ano de Sciencaj Akademioj Finna kaj Hungara, honora doktoro de la Helsinki-a kaj Tampere-a universitatoj kaj ano de la Lingvista Asocio de Usono ...

Debuto en Esperanto

Sian unuan verkon li verkis en Esperanto, aĝante 14 jarojn, unu el liaj libroj estas verkitaj en la cigana lingvo, aperis lia gramatiko de la vota lingvo idiomo parolata de eta — dekkvin-opa — gento en Sovetio.

Surprizas la vasteco de interesoj de Ariste: folkloro, etnografio, interlingvistiko. Sed la ĉefa temo de liaj esploroj ĉiam estis la historio de la finno-ugraj lingvoj. Laŭ la verkoj de Ariste eblas sekvi la longan historian vojon de finno-ugraj popoloj — inter ili estonoj, finnoj, hungaroj — el la areoj de ilia prapatrujo ĝis tiuj lokoj, kie ili nuntempe vivas.

Profesoro Ariste tute ne similas „kabinetan scienculon". Vigla, gaja, iom ironia homo li estas, kiu ĉiam estas okupita, ĉu en prelegejo, ĉu en ekspedicio, ĉu en la sporthalo. Foje li aperas en la cigantendaro, kiu alvenis Tartu-on speciale por kanti al la profesoro siajn kantojn.

Kun Paul Ariste ni konas unu la alian jam preskaŭ dudek jarojn. Ni ofte renkontiĝis en kunvenoj de esperantistoj en Moskvo, en Tallinn kaj ekster la landlimoj. La profesoro legis mian dokumentromanon *Homo Miriginta la Mondon* pri la blinda poeto, vojaĝanto, poligloto Vasilij Eroŝenko, kaj li volis paroli kun mi.

— Mi renkontis la heroon de via libro — li diris. — En 1923 kunvenis la 15-a UK de Esperanto en Nurnbergo. Tie partoprenis ankaŭ Vasilij Eroŝenko. Li eĉ donacis al mi unu el siaj libroj. Tio okazis en Germanio sed en mia memoro tamen ĝi ligiĝas kun Hungario.

— Kial kun Hungario?

— Mi aĝis tiam dekok jarojn, Eroŝenko jam pli ol kvardek. Sed en ni ambaŭ sidis ia diablo, bolis la troa energio. El Hungario alvenis Nurnbergon grupo de amataraj aktoroj, kun ili verkistoj Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay, kiuj prezentis iun tre gajan spektaklon. Ni decidis helpi al ili. Krome nin kunigis diskutoj pri la poezio, pri la literaturo ... Eroŝenko ricevis en la konkurso de Esperanta poezio la unuan premion por la poemo *Antaŭdiro de la Ciganino*. Kálmán Kalocsay, kiu jam tiutempe estis konsiderata majstro, partoprenis en la ĵurio.

La profesoro daŭrigas:

Mi eklernis la hungaran...

— Vidante Eroŝenkon mi ekpensis: li, la blindulo, povis ellerni dekojn da lingvoj, travojaĝi la mondon. Kial ne povus atingi tion mi, vidanta, sana, ankoraŭ tute juna ... Post la kongreso mi vojaĝis al Ĉeĥoslovakio, poste al Hungorio. Tie mi komprenis, kion signifas esti „senlingva homo". Sen miaj amikoj Baghy kaj Kalocsay mi eĉ paŝon ne povintus fari. Reveninte hejmen, mi ekstudis la hungaran lingvon, kaj antaŭ mi malfermiĝis la profunda ligo, kuniganta la parencajn finno-ugrajn lingvojn, iliajn historiojn.

La profesoro interrompas nian paroladon, li diktas pertelefone telegramon. Hodiaŭ ja estas jubileo de unu el liaj helpantoj. Li estas voto, dank' al kiu Ariste povis verki la gramatikon de la vota lingvo.

— La votoj — klarigas la sciencisto — estas parencoj de la estonoj kaj iomgrade de la hungaroj, sed al estonoj ili staras pli proksime. El ili restis dur dekkvinopo. Tio estas praa gento, formiĝinta antaŭ pli ol trimil jaroj. Tiam la votoj kaj la estonoj bone interkomprenis, poste iliaj lingvoj disiĝis. Tamen komparo de tiuj du idiomoj helpas kompreni ne nur iliajn pasintojn, sed ankaŭ estinton de iliaj finno-ugraj antaŭuloj.

Finno-ugrologio estas amo, pasio de Ariste. Li infektas per ĝi ankaŭ siajn studentojn. Prelegoj de la profesoro similas prezentadojn de aktoro en amika rondo. Kun la studentoj li parolas kiel kun egaluloj, per tio li provokas sincerajn alparolojn, diskutojn. Ofte ili pri-

parolas sciencajn temojn apud tasoj da kafo.

Nun ni sidas en Kafejo Sofoklo de la Tartua Universitato kaj al ni aliĝas studentoj, aspirantoj, simplaj konatoj de Ariste. Kun Aristids Medinŝ, alveninta el Latvio, la profesoro parolas latve, al iu studento li respondas en la mordva* lingvo, kun László Szőke, aspiranto el Hungario, li hungare priparolas artikolon de sia kolego, profesoro de la Budapeŝta Universitato ELTE, Gábor Bereczky...

— Ĉu vi ofte estis en Hungario? — mi demandas, eluzante paŭzon en la interparolado.

Mi amas Hungarion...

— Multfoje mi vizitis ĝin. Mi amas tiun landon, ĝiajn loĝantojn. Kompreneble, mi subtenas konstantajn kontaktojn kun la hungaraj lingvistoj. Mi esperas multajn el ili renkonti la sekvan kongreson de finno-ugristoj, okazonta ĉijare.

Mi aŭskultas, kiel parolas Ariste kaj min surprizas kiel artisme li posedas lingvojn. Jus aŭdiĝis el lia buŝo la latva lingvo, nun li parolas ruse en la Moskva dialekto, li scias germane, angle, france. Mi demandas la estimatan profesoron, kiom da lingvoj li parolas?

Ariste respandas ŝerce: la lingvojn, kiujn mi parolas, fakte ne eblas kalkuli, ĉar ili estas kelkdekope. Sed en la mondo ekzistas kelkmil idiomoj, ĉu gravaş pli aŭ malpli je unu lingvo...

— Bonvolu rakonti, kiel vi iĝis poligloto?

La vojo al poligloteco

Ariste ekmeditas. Pri kio? Verŝajne, li rememoras sian infanecon en malgranda vilaĝo Torma, situanta sepdek kilometrojn de Tartu, kie li ekvidis la lumon kiel filo de vilaĝa forĝisto kaj servistino de bienulo.

— La gepatroj, nature, parolis kun mi estone. Proksime al nia vilaĝo loĝis rusoj kaj germanoj, mi ellernis paroli ankaŭ kun ili. Post la transloĝiĝo al Tallinn nia familio amikiĝis kun svedaj laboristoj. Sed kia estas la amikeco, se oni ne komprenas la lingvon de la alia? Mi ellernis do la svedan. Mi rememoras, ke proksime al nia domo bivakis cigana tendaro. Mi konatiĝis kun knabeto, natura pedagogo, kiu instruis al mi sian gepatran lingvon. Poste mi ekvolis korespondi kun la tuta mondo, kaj mi ellernis Esperanton.

Kelkajn lingvojn mi ellernis studante en la Tartua Universitato, poste okupiĝante pri lingvistiko en Finnlando, Svedio, Germanio kaj aliaj landoj. Sed mi volus noti: ajna scio havas limojn. Ekzemple estone, ruse, finne, germane, svede mi scipovas eĉ pensi. Mi regas la hungaran, la ciganan, la mordvan, sed jam ne tiom libere. La angla, la germana, la franca lingvoj helpas min dum miaj eksterlandaj vojaĝoj. Kaj kelkdeko da orientaj kaj okcidentaj lingvoj kuŝas en mia memoro kaj mi aktivigas ilin laŭbezone.

„Se aliaj feliĉas pro tio, ke vi vivas..."

— Vi aĝas 75 jarojn. Vi vidis multon. Diru, ĉu vi estas feliĉa?

Ariste ekridetas: kion signifas la feliĉo? Eble la socian rekonon? Jes ankaŭ tion. Nu, li estas ano de kelkaj akademioj, en sia 70-a naskiĝtago li estis distingita per ordeno „Amikeco de Popoloj". Onidire, la feliĉo kuŝas en la laboro. Li traveturis la tutan mondon, verkis dekojn da libroj, eĉ kuŝante en hospitalo li laboris: akceptis studentojn. Onidire, la feliĉo estas en la familio, en la gefiloj, kiuj vin daŭrigas. Li havas filon kibernetikiston, filinon historiiston kaj kreskas jam kvar genepoj. Lia edzino estas arkeologo, kun kiu ili jam festis la „oran nuptofeston".

— En multaj finno-ugraj lingvoj la vorto „feliĉo" signifas ankaŭ „sorto"-n — diras profesoro Ariste. — La homo estas mastro de sia sorto. Mi akiris tion, pri kio mi revis en la junaĝo. Sed tio estas malmulta. Iu diris: „Feliĉo estas, se aliaj feliĉas pro tio, ke vi vivas..." Mi volus kredi, ke mi vivis ne nur por mi sola.

El la rusa: *Péter András Rados*

* Finno-ugra lingvo, parolata de unu miliono da homoj en Sovetio.

JULIUS BALBIN

MAUTHAUSEN

Ĉepinte
kaj
laŭdeklive
de
altgermana
gemuto
pedikoj kvazaŭ termitoj
diligente
kaj
laboreme
fosas
en sennombraj korpoj
monumenton
al
la Miljara Regno.

Striitaj ĉifonoj
pendas loze
de kavernaj kadavraj
korpoj
malbenitaj
de
nasko
aŭ
de
blinda hazardo
dum ili
ŝvitkovritaj
silente
fosas
en la senfina
ŝtonminejo
sufokate
de
la ridetanta suno.

Multegaj pliaj
jam estas ekspeditaj
*al jenseits**
Iliaj senlumaj okulkavoj
jam ekvidis
la indiferentan
Dion
Iliaj sensangaj lipoj
jam ekflustris
neniu scias kion
al la postlasitoj
antaŭ ol eksori
ĉielen
kun kriĉantaj fumoj
de
la krematorio.

* jenseits (germane)
— transe, transmonde

Realo kaj arto



Generacioj, 1932

En ŝtormo, 1931

Multaj diras, ke la vera, grandtalenta arto estas tute, tute alia, ol la vivo, la realo. Sed la vero estas, ke „pura" arto, fremda al la vivo, eĉ ne eblas.

La legantoj de tiu ĉi rubriko jam scias, ke en la Hungara Nacia Galerio (Budapeŝto) oni povas vidi ĉiam ion tre interesan, memorindan. Dum la pasinta aŭtuno oni aranĝis la plej riĉan ekspozicion el la verkaro de Gyula Derkovits (pron. derkovič), (1894—1934). Lia arto estas eminenta fenomeno ne nur en la hungara, sed ankaŭ en la progresema pentroarto de la mondo.

Kiel mi povas pruvi tiun ĉi aserton, ja mi povis elekti nur kelkajn bildojn — el 318? (Kaj sen vivigaj koloroj!) Tamen mi kredas, ke ankaŭ kvar kreaĵoj sufiĉas — se temas pri malofta, benite talenta homo. La jaroj, en kiuj naskiĝis la bildoj (1928—1932), estis la plej malhela periodo de la faŝismo en Hungario.

Ne estas hazarde, ke Derkovits (estinta meblisto, invalido, tuberkulozulo, aŭtodidakta pentristo) kreis la serion *1514* (lignogravuraĵoj). La *hungara 1514* estis unu el la mezepokaj Eŭropaj kamparanaj revolucioj, kiun sekvis terura venĝo, postulanta la vivon de cent mil kamparanoj. Pendigo, krucumo, ŝtipara morto kaj la specialaĵoj por la gvidanto, György Dózsa: ardaj fertrono, ferkrono. La bildo *Sur ŝtiparo,* 1928—29 estas el tiu serio.

Kion deziris kamparanoj en 1514? Panon, liberon. Kion petis hungaraj laboristoj en 1929—32, dum la granda ekonomia krizo? Kion postulis protestantoj sur la Budapeŝtaj stratoj en 1930? Panon. „Laboron kaj panon!" Kaj la respondo? Polico, glavbatoj, kolbo, fine pafaro. Jen la realo de la tiama vivo: *Por pano (Teroro) 1930*

Al kiu ismo apartenas tiu ĉi pentraĵo: al realismo? naturalismo? simbolismo? — Videblas nur malgranda parto de la strato, policbotoj, pafoj, sanga paneto kaj nur la kapo de la martiro. La bildo estas mem la vero.

Kiel simpla estas la titolo ankaŭ de la tria bildo: *En ŝtormo, 1931!* Nenio eksterordinara — nur suburbo vintro, laboristedzinoj, infanoj, ĝendarmoj kun pafiloj. Nur la tiama vivo.

Jes, la socia situacio, perspektivo estis senkompata, terura, malesperiga. Tamen Derkovits pentris la esperon, la neeviteblan estonton: *Generacioj, 1932.* Antaŭe sidas la patro (la pentristo), legas, lernas, preparas sin por la futuro, kiu certe alvenos, ja malantaŭe brilas la futuro: lia filo (kiun ĝuste nun manĝigas la edzino), kaj la estinto: pale videblas en spegulo portreto de Marx, kreinto de la revolucia ideologio. Majstra bildo, kies efikon ankoraŭ emfazas ĝiaj koloroj, nuancoj de ruĝo.

Derkovits estis nur 40-jara, kiam la mizero, malsato, tuberkulozo mortigis lin.

Homoj, kiuj ŝatas kaj aprezas lian arton, iniciatis en Szombathely (Okcident-Hungario, lia naskiĝurbo) konstrui apartan muzeon por liaj bildoj. Post kelkaj jaroj ricevos indan lokon lia bildaro, kiun ni povas kompari nur al la verkaro de la plej grandaj progresemaj pentristoj de la 20-a jarcento.

Mihály *Gergely*

Por pano (Teroro), 1930



Sur ŝtiparo, 1928—29

„Patrino-pinoj" en Szentpéterfa

PANORAMO P

„SUDIGO" de pinoj

La arbaro estas la plej malnova fonto de energio kaj krudmaterio de la homaro, kies rolon malgrandigis nek la artefaritaj materioj, nek la metaloj. Ĉi tiu energiofonto krome utilas ne nur ekonomie, sed per sia oksigenproduktado favore' efikas al la homa medio kaj ĝia rolo en ĉi tiu funkcio ĉiam pli kreskas.

En tuta Eŭropo montriĝas problemoj rilate al la arbaroj, tial konstatis la Eŭropa Komitato pri Arbaroj en aŭtuno de la pasinta jaro, ke la kreskanta pretendo pri arbaraj produktaĵoj nur tiam estos kontentigebla, se ĉiu lando ampleksigos siajn arbarojn, maksimume eluzante siajn arbo-produktajn eblecojn.

Hungario ne estas riĉa en arbaroj, kaj speciale ne en pinoj, kvankam 50 procentoj de ligno-produktaĵoj estas faritaj el pinoj. La terenon de Hungario apenaŭ tuŝas la natura zono de pinoj, tial la arbaristoj jam de du jarcentoj eksperimentas pri alklimatigo kaj produktado de pinoj. En la lastaj tri jardekoj oni okupis sin eĉ pli intensive pri ĉi tiu laboro, kaj la scienculoj sukcese selektis tiajn „patrinoarbojn" kiuj heredigas siajn plej favorajn ecojn kaj donas bazon por la novaj elitarbaroj. La unuaj eksperimentaj plantejoj estis lokigitaj en Okcidenta Hungario (plej konvena tereno por pinoj) sed la plantaĵoj jam bone kreskas eĉ en la sablo inter la Danubo kaj Tiso.

La konscia laboro de scienculoj rezultigas, ke la riĉaj plantejoj ĉiam pli kontentige povas servi la estigon kaj la renovigon de pinarbaroj per liverado de selektitaj, eminentaj arbetoj kaj semoj.

Aŭstra—hungara kunlaborado

Antaŭ unu jardeko oni malkovris ligniton apud la vilaĝo Torony, ĉe la aŭstra—hungara landlimo. Ĉirkaŭ kvin sesonoj de la grandampleksa lignito-kampo troviĝas sur hungara tereno kaj unu sesono en Aŭstrio. Ĉi tiun lignittrezoron de 1800 kalorioj komune utiligos Aŭstrio kaj Hungario. La interkonsento, kiu difinos la principojn de la kunlaboro, estis subskribita en la komenco de la jaro 1980. La minejo estiĝonta en Hungario kaj la termoenergia centralo konstruota en Aŭstrio, konsiderinde plibonigos la aŭstran energio-provizadon kaj akiros signifan eksportenspezon por la hungara ekonomio.

La kunlaboro inter la du landoj rilate al la elektroenergio bone funkcias jam de pli ol unu jardeko. La kuranto-interŝanĝo atingas 250 milionojn da kilovathoroj. La energio-sistemo de Aŭstrio plej multe baziĝas sur la akvocentraloj, kies funkciadon multe influas la vetero. Tiel somere, kiam la akvocentraloj laboras kun plena kapacito ili donas energion ankaŭ al Hungario, kaj vintre la hungaraj centraloj helpas la aŭstran energio-sistemon.

La geologiaj esploroj asertas, ke la lignitkampo ĉe Torony certigas hejtmaterialon por la konstruota Aŭstria termocentralo dum 40 jaroj, kaj tiel kovros proksimume 10 procentojn de la energio-bezono de Aŭstrio. La aŭstraj fakuloj kontente observis tiun hungaran termocentralon, kie la teknologio pri utiligo de lignito jam estas elprovita. Nome en Gyöngyös (Norda Hungario) oni uzas jam de jardekoj ligniton kun bona rezulto, kaj tiel malkare produktas elektran energion.

Surfaca minado sur la lignitkampo ĉe Gyöngyös-Visonta



NORAMO

Parto el la ekspozicio de ekleziaj artobjektoj en la Artindustria Muzeo, Budapeŝto

Revuo de religia arto

Trezoroj de ekleziaj kolektaĵoj estas ekspoziciitaj en la Artindustria Muzeo de Budapeŝto. Religioj, kiuj iam persekutis unu la alian, konfesioj iam subpremitaj atestas pri si mem en la prezentitaj sanktaĵoj, kalikoj, statuoj, liturgiaj roboj, preĝejaj ornamaĵoj. Laŭstile ili estas produktaĵoj de la Eŭropa kulturo, sed samtempe ili fidele informas ankaŭ pri la nacia kulturo, pri klereco kaj gusto de la socio en la koncerna epoko. Ĉi tiuj objektoj estas juveloj de la historio kaj ne nur la delikate cizelitaj artaĵoj el oro kaj gemoj, sed ankaŭ la naivaj ceramikaĵoj de malnovaj vilaĝaj potfaristoj.

La eklezia arto antaŭ kelkaj jarcentoj signifis preskaŭ la arton mem, kaj la homon, pri kiu la Eŭropaj religioj neniam rezignis, tial ĉi tiu arto apartenas ankaŭ al la kulturo de nia epoko.

La grandsukcesan ekspozicion inaŭguris Ferenc *Molnár*, ŝtatsekretario de la Hungara Kultura Ministerio.

La interna ŝtuparo de klasika nobleco en la Hungara Nacia Muzeo

La kupolohalo kun kasetoj

Inda turisma celo

Multaj romantikaj ruinoj ornamas la suprojn de montetoj en Hungario, sed malmultaj restis tiom sendifektaj kia estas la fortikaĵo Rákóczi en Szerencs (en Norda-Hungario). La originalan monaĥejon el la 13-a jarcento la postaj posedantoj fortikigis laŭ la postuloj de la epoko, kiun karakterizis la defendaj bataloj kontraŭ la turkoj kaj la Habsburga regado. Nur de la 17-a jarcento ĝi apartenis al la familio Rákóczi, sed tiam ĝia historio estis riĉa je gravaj eventoj. Post la malvenko de la liberbatalo de Ferenc Rákóczi (1711) kune kun ĉiuj liaj aliaj havaĵoj ankaŭ ĉi tiu fortikajo estis konfiskita.

La komplekso de artobjekta karaktero konsistas el kvar konstruaĵoj. El ili la ekstera fortikaĵo jam estas renovigita kaj funkcias kiel hotelo. Muzeo, biblioteko kaj kultura centro estas establitaj en la interna kastelo. La rekonstruado plue daŭras ĝis la tuta fortikaĵo Rákóczi estos videbla en ĝia originala beleco.

Korto de la renovigita fortikajo-Rákóczi en Szerencs



Datreveno de arkitekto

En Szeged estis aranĝita festa kunsido de la Asocio de Hungaraj Arkitektoj kaj de la Ligo de Teknikaj kaj Sciencaj Asocioj honore al la arkitekto Mihály Pollák mortinta antaŭ 125 jaroj. Li estis majstro de la hungara novklasika stilo. Lian noblan guston kaj grandan fakscion laŭdas eĉ hodiaŭ preĝejoj kaj pluraj elegantaj palacoj en Budapeŝto. Lia ĉefverko estas la Hungara Nacia Muzeo en Budapeŝto, kies arkitekturo kaj ekstere kaj interne estas unu el la plej noblaj ekzemploj de la novklasika stilo en la unua duono de la pasinta jarcento.

LEHEL

H60F ****

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO



HÜTÖGÉPGYÁR Jászberény

REVUO DE REVUOJ

Esperanto parolata! Se oni vidas tiun afiŝeton ie, la koro ĝoje pulsas: jen eblo *paroli* nian belsonan lingvon, facilan kaj elegantan, ja ĝi estas ĉefe *destinata por interparoli!* Gazetoj de tiu ĉi lingvo, kiu estas praktikata tamen plejparte surpapere, havu la kuraĝon levi la standardon por la *parolata* Esperanto... Troviĝas vere mankoj tiurilate en la lingvovivo: grupkunvenoj, kie la plimulto ne parolas, aŭ se jes, ne Esperante; internaciaj renkontoj kun izolaj, nacian lingvon parolantaj grupetoj; karavanestroj, kiuj fiere alparolas la gastigantojn propralingve kaj arogante atendas komprenon de esperantistoj, kompense por la pagita kotizo. Kvankam altrudi ankaŭ ne decas niaflanke, nek igi paroli iun kiu — eble eĉ propralingve — ne intencas diri ion, tamen multe pravas en BRITA ESPERANTISTO la sprita artikolo de *Don Lord,* dezirante pli emfaze trakti en la movado tiun aferon.

Ĉar mankoj, foje eĉ pekoj troviĝas ankaŭ, flanke de la movado! Oni povas demandi, ĉu nia propra E-kulturo sufiĉe flegis la ĉiutagan, surstrate kaj enfamilie necesan lingvaĵon? Antaŭ unu jaro mi laŭde rimarkigis pri familia vortkolekto — tre necesa! — en la sveda LA ESPERO. Ĉu vi memoras ankoraŭ pri tiuj „bebaĵoj"? Por ĉiutagaj temoj, por simpla konversacio oni bezonas ja stimulojn, doni modelojn, skribe kaj buŝe aŭdigi kelke da imitindaj parelturnoj, konversaciaj esprimoj kaj tiel plu. Bonvolu ne forgesi, ke la „bonan tagon"-esperantistoj havis je siaj niveloj kaj bezonoj *eble nur* tiaspeciajn model-esprimojn.

Por siaj bezonoj — mi ĵus akcentis, ĉar lernolibroj ĝenerale, kaj prave, antaŭmetas la kompletajn, altstile senerarajn (ĉu certe? — *rim. de red.)* frazojn, kvankam la simpla konversacia, societa stilo plejofte uzus malpli kompletajn esprimojn, bonvenigus familiarajn frazerojn, por ne paroli pri intimaĵoj. Se oni jam kapablas *ludi* per sia ne-granda vortstoko, tiam la interparolado tuj iĝas malpli monotona kaj teda, efektiviĝas la ebleco *ĝui la fremdlingvon* (la nian!), certe por la plimulto *la solan* fremdlingvon, kiun oni kapablas manipuli. Kia plezuro, dio mia!

Samideano Don Lord — kies nomo ŝajnas al ne-angloj kvazaŭ internacieca — metis sian fingron sur gravega butono kun tono tute ne gravmiena. Kunvenoj de „denaskaj", de E-familioj jam paralele ekpremis tiun aferon al la publik-fokuso. Li akcentas interalie la neceson de (lingva) *eksperimentado,* tute prave, kaj espereble por multaj rave. Oni ne timu tion, ja funde de la Fundamento ekzistas multe da tio, kaj ĉu estis iu pli eksperimentema ol Zamenhof mem? Inter tiaj provoj en diversaj bone redaktitaj E-revuoj (multaj estus menciindaj) sen memlaŭdo mi aludas al kelkaj „surprizaj" eksperimentoj en H. V. pri antikveca lingvaĵo (Haszpra), pri plej vulgara lingvaĉo (Fejes), pri modern-utiligoj alispecaj de simpla stilo ĉiutaga. Ĉu taŭge? Laŭ kelkaj akregaj kritikoj — inter kiuj troviĝis ankaŭ misaj *tritikoj* forĵetindaj — ni forlasis la idealojn; tamen juĝu la estonto, plejeble jam la nuna, forte vastigenda publiko. Oni trovas ankaŭ en niaj diversaj rubrikoj tendencon jen por sprito, jen per ek-spliko malbanala situaciojn de la ĉiutago. Helpu sukonfosi!

KOMUNA ESPERANTO GAZETO de Nederlando, samkiel la sveda LA ESPERO metis demandojn al parlamentaj kandidatoj, respektive al deputitoj pri ilia opinio kaj sinteno rilate Esperanton. La ideo *pripensigi* tiujn gesinjorojn pri la akriĝanta lingvo-problemo montriĝis kvankam ne sukcesa, tamen ege grava, ĝuste tial, ĉar ĉe multaj evidentiĝis nekomprenemo, por ne paroli pri la totala nescio foje. Mirinde, kiel kelkaj imagas sian popolon jam fremdlingvojn reganta (temas verŝajne pri „gudbaj"-nivelo), kiel supraĵe, preskaŭ orgojle aliaj flankenigas la problemon de la loĝantaro, klare aludante al *siaj* oficiale atingeblaj interpretistaj kaj teknikaj subtenoj. Ne mankas kompreneble iomete ĝentilaj prespektivoj favore al Esperanto, sed en ambaŭ landoj — relative malgrandaj! — prezentiĝas politikaj retenoj, parte favore al la angla, kio estas facile klarigebla pro ekonomiaj kialoj. La proponoj de kelkaj svedaj deputitoj por pli multe propagandi inter junularo E-on, precipe per publikaj disputoj, montras al bona direkto, tamen ni samtempe povas konsideri tiajn proponojn kiel eviton de la persono pri starpunkto. Ankaŭ klare vidas kelkaj svedoj, ke la internacia lingvo-problemo iĝas finfine afero de la grandpotencoj („etaj grupoj tamen favore utiligi povos E-on", malagrable ŝajnas tamen, ke rezigneme pri nacia starpunkto, oni ne inklinas „enmiksiĝi" en aferon de la granduloj.

Mi kredas — jam laŭ spertoj —, ke niaj organizoj devas kapti la bonintencon kaj favoron ĉe kiuj tio manifestiĝas! Oni ne atendu de kelkaj deputitoj *solvon* de monda problemo. Prefere konvenas kapti iliajn esprimitajn bonvolojn, tiujn fiksi laŭeble en ia organizita formo, utiligi ilin *tra etaj paŝoj,* kaj por la propaganda agado, kaj por ŝtata subteno, instruado, laŭ la landaj cirkonstancoj. La kelkaj amikoj, iamaj samideanoj inter ili, povos multrilate helpi en la asocia laboro, se tiuj komencitaj kontaktoj — post kiuj pluraj certe modifos negativajn opiniojn — estos daŭre flegataj de la lertaj enketantoj. Ne malkonvenas — videble — se revuanto legas ne nur Esperantan tekston...

En la lastaj jaroj oni prave fingromontris la nepran bezonon ampleksigi la *fakan flankon* de niaj lingvo kaj movado. Ŝajnas, ke tiu interna intenco atake akiris jam konsiderindan — kvankam ankoraŭ ne sufiĉan — gravecon en nia kulturo. Mi preferas taksi tion ne laŭ libro-eldonado — pro kompreneblaj kaŭzoj — sed laŭ la plivastigita tereno en niaj gazetoj, oni povas diri, en *ĉiuj* niaj gazetoj. Elstaras certe la avantaĝe redaktitaj „sciencaj suplementoj" de HEROLDO, kie eĉ la „malfacila" matematiko aperis per interesvekaj, porpopolaj artikoloj. Kaj tiel plu en ESPERANTO, KONTAKTO, LITERATURA FOIRO... ne laste en la SKOLTA MONDO. Konforme al nia kulturstrukturo, akceliĝis internaciaj agadoj pri fakaj vortaroj, kaj meritas mencion, ke tiuj estas necesaj ne nur pro — foje — absoluta manko, sed en multaj branĉoj pro la rapidritma evoluo, t. e. per refreŝigo vortara, probable en pli mallongaj temp-intervaloj. Vere sciencaj *internaciaj kunvenoj* plioftiĝas, kiel konate; pri tiaspeca seminario ni legis en la ĉeha START0, respektive pri la kolekto de la seminariaj referaĵoj faritaj en la slovaka urbo *Žilina.* Ni eksciis pri diversaj sciencaj-teknikaj esploroj/studoj, de mineraloj ĝis (?) energetiko, apud kiuj ne povis malesti teoriaj-praktikaj studoj pri fakaj vortaroj kaj terminoj. Fotoj kaj reklamoj (multaj!) kolore altigas la nivelon de tiu bulteno, kiu komencas esti pli grava kaj pli respektinda inter la dulingvaj landaj informiloj laŭ sia bone selektika enhavo.

Ervin *Fenyvesi*

Genia verkisto kaj humanisto de la mezepoka Vjetnamio

Nguyen Trai

(1380–1442)

Kvin jarcentojn vivis jam sendepende la mezepoka Vjetnamio, kiam komence de la 15a jarcento ĉina invado okupis la landon. La armeo de imperiestro Ming dum 20 jaroj detruis sisteme popolon kaj kulturon, ĝis fine grandioza — dekjara — popola batalo rekonkeris la sendependecon. La animo, heroo de tiu movado estis generalo Nguyen Trai, kiu lerte kombinis manovrojn de geriloj kaj de trupoj, kaj post la venko saĝe helpis instali forte centralizitan, pli modernan reĝlandon. Do *generalo* kaj *ŝtatviro?*

Se ni aldonas, ke li estis *poeto*-klasikulo, ni ankoraŭ ne finis... Nguyen Trai, kiu naskiĝis ĝuste antaŭ 600 jaroj, kreis la unuan seriozan *geografion* de sia lando, verkis ankaŭ profundajn *eseojn* filozofiajn kaj literaturajn, krome ankaŭ pri *historio*. Kvazaŭ iu eminentulo de l'Eŭropa renesanco... eĉ pli! Lia ampleksa verkaro estas parte kreita en la — oriente ĉie uzita — klasika ĉina. Esceptan gravecon portas lia poezio, ĉar la prestiĝaj poemoj eksonas ĉe li, la unuan fojon en la vjetnama literaturhistorio, pere de la lingvo popola (kinh aŭ nom).

Sekve de la nacia venko kaj renoviĝo, la literaturon forte inspiris patriotismo. La aspiroj de la popolo manifestiĝis kun emfazo de la humanaj sentimentoj. Tiutempe estis tasko de la poezio diskonigi kaj laŭdi la regantajn filozofiajn doktrinojn. Nia poeto ne hezitis intermeti siajn pli modernajn konceptojn, precipe pri justeco kaj humaneco. Lia strategia baza principo: „Estas pli utile konkeri la korojn el la citadelojn" aludas al la popolo, nepra bazo de la liberiga milito — sed ankaŭ admonas atenti pri soldatsuferoj de la malamikaro. Ĉu ne estas rekoneblaj kelkaj *gvidprincipoj,* kiuj probable kontribuis al la admirindaj venkoj dum la ŝajne senfinaj agresmilitoj kontraŭ la moderna Vjetnamio, malgraŭ ties timigaj superfortoj? Sube oni rimarkos ankoraŭ paralelojn en kelkaj elektitaj — kompreneble nur mallongaj — verkaĵoj de tiu estiminda humanisto (en senco ĝenerala).

Ni tute ne emas profesorece analizadi la vastan verkaron, nek la prezentitajn pecojn de tiu orienta geniulo; la kara leganto gustumu ilin siaflanke, konsciante la efektivan spiritan kaj artan distancon disde la kutima Eŭropa pensmaniero. Bedaŭrinde mankas ankoraŭ — kvankam tre kompreneble! — antologio en Esperanto de la Vjetnamia literaturo, sekve multaj problemoj de tradukado ne estas solvitaj, precipe rilate la versojn. Nia profunda internaciismo tamen levis nian kuraĝon transponti la eventualajn malfaĉilaĵojn por ekkonigi iom la verkadon de Nguyen Trai okaze de lia jubileo.

E. F.

Nokte en sampano

Ondoj de l'mondo min pelis vagadi, dum kiom da jaroj!
Ĉi-nokte mi denove ligas alborden la propran sampanon.
Vibre briletas akvoj senfinaj, luno lumverŝas al plaĝo.
Disas ombro-konturoj de arboj, havenon superas vapora grizaĵ'.

Pasinton ne indas rekapti, malofte lasas sin ja okazo.
La patrujo atendas daŭre la venĝon. Sed ve, maljuno ligas!
Mi emis tutvive ĝuste ekkoni zorgojn popolajn.
Mi premis tutnokte al mia korp' ĉi kovrilon frostan.

*Letero al Vuong Thong**

La antikvuloj diris: „Ne pelu malamikon, kiu alvenis ĝis fino de sia forto." Mi estus kondukinta facile la tri-kvar centmilojn da miaj soldatoj kontraŭ viajn kvar citadelojn kaj fortikaĵojn; tamen mi konscias, ke sufokata birdo povas ankoraŭ uzi sian bekon, ke mortvundita besto povas ankoraŭ skrapi, kaj tial mi ne puŝis la venkajn trupojn, nek miajn mortpretajn volontulojn por akiri facilan venkon. Finfine ja, eta trupo, kiel ajn firmdecida ĝi estus, nepre estas neniigota! Neniam iu vidis ovon rezisti al roko.

Momente do ne temas pri atako kontraŭ viajn citadelojn. Mi povus tutsimple neglekti vian ekzistadon kaj ripozigi mian armeon: aranĝi konkursojn por la

Nguyen Trai (1380—1442)

talentaj kaj bravaj homoj, zorge riparigi la armilojn, trejni la homojn kaj la elefantojn, instrui militarton al oficiroj kaj soldatoj, eduki ilin al pli alta humaneco kaj justeco, enkapigi al ili lojalecon kaj sincerecon, konfidon al la superuloj, kaj ĝismortan submetiĝon al siaj ĉefoj. Jen, tiuj estas miaj armiloj por alfronti la malamikon. Kiuj venos kun mi, vivos, kiuj kontraŭagos min, pereos! Tiaj estas miaj atutoj.

Se iam via registaro forgesos pri siaj zorgoj, kaj dorlotante nove ambiciojn, ree sendus kelkajn dekmilojn da soldatoj por inundi nin, estus por ni preskaŭ nur ludo oponi ilin. Koncerne vin, ni eĉ ekbatali ne bezonas por meti vin en kaptitecon. Kvankam mi ankoraŭ ne decidis pri la farota maniero.

Mi ne scias, ĉu vi bone taksis la fakton, ke ni neniel interesiĝas pri via ĉeesto. Bonvolu do prezenti al mi vian opinion, mi sentos min tre honorigita.

* La ĉina generalo Vuon Thong, sieĝita en citadelo de Dong Quan sen sufiĉa nutraĵo, rifuzis kapitulacii, kvankam jam komenciĝis la pactraktadoj.

Reveno al Con Son en sampano

En ekzilo dek jarojn: ŝaŭme sur akvoj.
Tag' post tago revenon revanta, mia kor' fidela estis tremanta
Kiel foli' en vent'. Nur sonĝoj reportis min tra larma sent'
Lavi per kisoj tombojn de avoj, sangruĝa la pent'.

Damnitaj militoj, la fontoj de homaj missortoj.
For de l'patrujo, de fluoj amataj kaj montoj,
Al vi mia koro leviĝas, kiu senĉese sin arde turmentas!
Ĝis la aŭrora suno revenas, en la sampan' mi al kuseno min
triste returnas.

Maljusteco

(Suspektita esti komplico de iu ribelinta altrangulo, Nguyen Trai estis enprizonita.)

Dum kvindek jaroj flusoj kaj reflusoj: mi vagadis tra la mondo,
Senigita de l' rokoj kaj akvofaloj de miaj montaroj.
Kia komedio! Meritoj, honoroj paliĝas, sed fiaskoj validas,
Kaj kiom nombraj ili multas, ĵaluzi al la sole lojala, fia mizer'!

Se destinite tiel, apenaŭ ĝi eviteblos.
Tamen restas la amo al literoj, donaco de l'Ĉieloj,
Eĉ en prizono ne subiĝos mi al honto, slipaĉon aĉeti, por fuĝo
Utiligi la tekston. Ĉu flugos miaj petegoj al la Pordo Ora de l' Reĝo?*

* Aludo al iu kaptita mandareno, kiu per subaĉeto akiris de sia gardisto slipon, surdorse kun konsiloj kiel fuĝi el la prizono.

Vespero

Dometo forlasita, kabano sennajbara.
Nigra turbano, baston' en mano, mi promenas vespere.
Super senhoma vilaĝo alklinas jam suno, arbpintojn orumas
radioj krepuskaj.
Paŝantoj maloftas sur digetoj, la akvo fluadas sub pontoj.
Glitas la river' potence, pasinto, nuno sin sekvas senfine.
Remaĉas sian koleron heroo; tie—alie pelas foliojn la vento;
Revene, sur verando, mi ŝatas medite rigardi al Luno,
Spegulo glacia sur arkego de l' nokta ĉielo.

Konfeso de kredo

Ne konkursi por honoroj, nek por grasaj altaj rangoj,
Perdi, gajni sen ĉagreno, sen plezur', jen mia gusto.
Se fenestron baros akvoj, mian pordon roklavangoj,
Mia sako poemplene, humor' venos elbotele.

Maloftas jam konatuloj, harp' silentos. Am' de l' vivo
Igos al mi lasi fiŝojn pluen naĝi, ĉesi kapti.
Ĉesi kapti vantajn horojn kaj honorajn efemerojn.
Niajn tombojn herboj kovros, kiu vidos diferencojn?

Elfrancigis: Ervin *Fenyvesi*



BUDAPEŜTO, LA URBO DE BANEJOJ

D-ro Ferenc László:

Kuracbanejo Rudaŝ

En la vico de la kuracbanejoj de Budapeŝto la Banejo Rudaŝ meritas altan prestiĝon. Ĝi situas modeste ĉe la Buda-flanko de la svelta kabloponto Elizabeta, kvazaŭ kaŝante siajn trezorojn. Ĝiajn basenojn nutras dekunu fontoj: Mustafa, Gül Baba, Matiaso, Turka k. a., el kiuj nur du fontas interne de la banejo, la ceteraj elfluas ekster ĝi. Same ekster la banejo troviĝas — ene de la pontkapo — ĝia kuractrinkejo.

Alproksimiĝanta fremdulo, vidante la kupolhavan ŝtonkonstruon probable jam konjektas, ke ĝi ne estas ia kutima konstruaĵo. Kaj vere: oni renkontas monumenton el la plej malnovaj en Budapeŝto, kiu — precipe interne — estas aparte valora, eĉ kurioza. Apude romantika eta ĝardeno invitas post banado ripozi kaj admiri grandiozan laŭbon de centjara platano — en trankvilo, malgraŭ la ĉirkaŭa granda trafiko.

Elinter dolomit-rokfendoj de la Gellért-monto elŝprucas varmaj kaj varmetaj mineralakvoj, kiuj estis utiligitaj jam de pratempo. Iliajn kuracefikojn konis jam la patrujon okupintaj hungaraj prauloj, kaj tiuj disfamiĝis en foraj landoj dum la unuaj hungaraj reĝoj, pere de ravitaj fremdaj vojaĝantoj.

La historio de la kuracbanejoj en Buda komenciĝis kune kun la unuaj loĝlokoj inter la montoj de Buda — ankaŭ ĉe piedo de la

◀ **La Banejo Rudaŝ, antaŭe la ĝardeno kun turkepokaj ruinoj**

La turkdevena baseno de Rudaŝ

Gellért-monto. Ilian kreiĝon favoris ankaŭ la tie abunde suprenvenantaj termoakvoj, krom la gravaj komercaj kaj militaj vojoj sur tero kaj rivero, la konvenaj Danubaj trapasejoj. Kiel ni menciis en la antaŭa artikolo, la trovaĵoj en *Aquincum*, la rezultoj de arkeologiaj fosadoj pruvis, ke jam antaŭ du miljaroj ekzistis tiuloke matura bankulturo.

Duonjarcenton post la morto de reĝo Matiaso en 1536 aperis verko de Nikolao *Oláh* kardinalo de Esztergom, aŭestanta, ke sub tiu elstara renesanca reganto ankaŭ la banejoj de Buda renaskiĝis. Laŭ tiu priskribo la reĝa banejo troviĝis ĉe piedo de la Gellért-monto, kaj apude, dudek paŝojn disde la Danuba bordo elfluis la fontoj. Tiujn oni uzis precipe por kuraci ekzemajn kaj atrofiajn malsanojn.

Dum la turka okupado la banejoj de Buda atingis novan floradon. La elŝprucantaj termoakvoj prezentis eblecojn eĉ por la plej vasta bankulturo. La paŝaoj de Buda konstruigis aron da pompaj banejoj, kaj meritis per tio religiajn kaj politikajn honorojn.

Kiel multaj aliaj, ankaŭ la nuna Rudaŝ banejo ekfloris dum la turka regado. La pli frua konstruaĵo estis en 1566 renovigita fare de *Sokoli Mustafa*, 12a paŝao de Buda. Lia rekonstruado estis tiel sukcesinta, ke de tiam *senĉese* funkcias la basenhalo sub la turka kupolo. Kaj tiam, kaj nun la urbon spektakle ornamas tiu ĉi turka banejo, dekretita jam „arta monumento". La memoron de la elstara banejkonstruanta paŝao gardas la fonto Mustafa, nomita pri li, kaj ties akvo eĉ nun nutras la Banejon Rudaŝ. Sokoli Mustafa kreis per Rudaŝ daŭran valoron: en la arkitekture riĉe kaj harmonie komponita halo de la basenoj, tegita per turkstila kupolo, ankaŭ nuntempe miloj kaj miloj serĉas—trovas sanon, refresiĝon.

La verdkolona banejo

La turkoj siatempe nomis la nunan Rudaŝ „verdkolona banejo" (jeŝil direkli iliĝe), ĉar la volbon subtenis ok kolonoj super la granda baseno, kaj el tiuj unu estis verdkolora. Tiun nomon jam *Evlia Ćelebi*, la fama turka mondvojaĝanto mencias, post lia vizito en 1660.

La kerno de la nuna banejo estas la „turka banejo": okangula baseno sub kupolo, kiun subtenas ok kolonoj. Ekde la turka regado ĝi restis tia, kun bagatelaj modifoj postaj. Laŭ iamaj mencioj, la banmastroj havis gravan rolon: ili plenumis ankaŭ certajn taskojn de kuracistoj, samtiel de barbiroj. En la 16a jc. oni precize preskribis la ilojn por la banmastroj; inter ili estis diversaj tondiloj, kupoj, tenajloj, dento-tiriloj k. a. Tiu diverseco klare pruvas, ke en la banejoj — krom sinpurigo — okazis kuracadoj, ofte eĉ per „sangaj", kirurgiaj metodoj.

Kabineto en la bankuvo-sekcio „Juventus" en la Banejo Rudaŝ

La dekadenco

Post reokupo de Buda la Banejo Rudaŝ transiris en posedon de la urbo. Tiam ĝia nomo estis Burĝa Banejo, sed oni skribis ankaŭ pri Ponto-Banejo. En skribaj mencioj dum la unua duono de la 19a jarcento ĝi ricevis ankoraŭ favorajn taksadojn, sed poste ĝin kovris kreskanta silento — samkiel pri la banejoj Tabán kaj Rác. Pli kaj pli malkreskis ja tie la vizitado, kion kaŭzis ĉefe la daŭra malboniĝo de la konstruaĵo, ties difektiĝoj. La neglekto flanke de la banejluantoj, kiuj apenaŭ zorgis pri bonstato de la banejo, fine necesigis kompletan renovigon kaj modernigon. Kaj tial, kaj pro la tro eta sumo pagita de la luantoj, en 1866 la asembleo de urbo Buda decidis preni al si nem la direktadon de la Banejo Rudaŝ. Transpreninte baldaŭ la banejon, la urbo per ordono malpermesis, ke viroj kaj virinoj komune uzu samtempe la banejon, kio estis tradicia kutimo depost forpelo de la turkoj.

Sukcesa prospero

Dum la urba direktado sekvis paŝon post paŝo alikonstruado de la opaj bansekcioj. En 1883 estis finita konstruado de *nova termobanejo,* kaj en 1896 oni inaŭguris *naĝbasenon.* La pluaj planoj tamen ne povis realiĝi pro la unua mondmilito.

Post tio oni konstruis *trinkhalon* (1924) por utiligi la fonton „Hungario", kaj baldaŭ oni devis ĝin pliampleksigi (1933). En 1932 ekfunkciis la *bankuvo-sekcio „Juventus".* Samtempe pro kreskanta bezono pri kuracakvo, post sukcesaj boradoj oni malfermis la putojn *Attila* kaj *Juventus.* En 1936 tiuj putoj jam plene aliĝis al la uzitaj naturaj fontoj, eĉ aldene oni boris la puton *Hungario II.* Estas menciinde, ke la Ministerio pri Internaj Aferoj oficiale aprobis en 1933 — laŭ la „banejleĝo" — la Rudaŝ kiel kuracbanejon.

Tiutempe oni ampleksigis la bankuvo-sekcion „Juventus", instalis *medicinan prizorgejon* kun konsultejo, kaj sur la etaĝo modernan *kurachotelon* kun 23 ĉambroj. La termobanejo estis modernigita en 1942.

La Banejo Rudaŝ funkciis kun sekcioj de termobanejo, bankuvoj, naĝbaseno, hotelo, trinkhalo kaj mineralakvo-uzino, ĝis 1944 —12—24, kiam pro la ĉefurbon liberigaj bataloj ĝin oni devis fermi. Pro la batalo ankaŭ la banejo suferis gravajn damaĝojn. Tute neniiĝis la hotelo-restoracio parto, grave difektiĝis la naĝbaseno, parto de la termobanejo kaj la bankuvo-sekcio. La tuta damaĝo estis taksata je 60—70%.

La vestiblo de Rudaŝ



En la trinkhalo de la Banejo Rudaŝ

La laboruloj de la banejo ofereme kaj entuziasme faris la restaŭrigajn laborojn. Rezulte de tio, la termobanejo estis malfermita je septembro 1945, jaron poste la bankuvo-sekcio „Juventus", kaj en 1948 ankaŭ la naĝejo. Ĝis 1953 ĉiu ĉi moderniĝis, eĉ ampleksigis per bela vestiblo, kaj baldaŭ ekfunkciis *reumo-hospitalo* kun 30 litoj.

La nova trinkhalo (1965) ricevis lokon sub la finaĵo de ponto Elizabeta, kun enirejo de la ĝardeno. Ĝi utiligas la kuracakvon de la fontoj Hungario, Attila, Juventus, kaj kun la promenantaj trinkantoj ĝi gravuriĝis jam en la kutiman aspekton de la nuna Banejo Rudaŝ.

La Rudaŝ funkcias dum la tuta jaro; la tegitan naĝejon vizitas ĉiutage 5—600, la termobanejon kaj bankuvojn pli ol mil en- kaj eksterlandaj gastoj. La statistiko pri vizitoj pruvas, ke ade kreskas la populareco de la kuracbanejo, same de la naĝejo.

Kion prezentas la akvo de Rudaŝ?

Estas rimarkinde, ke afiŝo el 1866 jam asertis — prave —, ke la akvo de Rudaŝ tre utilas „ĉe altan aĝon atingintaj personoj" por sanigado. Vere, la „junigan" efekton povas ĉiuj senti, kiuj ĉi tie serĉas resaniĝon, kaj same tiuj, kiuj venas *nur* por ripozi, refreŝiĝi, naĝi en la Rudaŝ.

En la banejo estas sanigeblaj artritoj, kronikaj kaj kvazaŭ-akutaj, degeneraj artiko-malsanoj, hernio de intervertebra disko, neŭralgioj, kalkmankoj de la ostoj, k. a. La radioaktiveco de l'akvo ne atingas tian gradon, ke ĝi povus difekti la organismon; male ĝi pliigas la metabolon kaj la funkciadon de iuj glandoj. Probable en tio kaŝiĝas ĝia „juniga efiko".

Multaj malsanuloj vizitas la trinkhalon, ĉar tie la kuracakvo konvene efikas ĉe kronikaj katar-malsanoj de stomako, intesto, gal-duktoj, spirorganoj, sed grave efikas ankaŭ trankviligante kaj sangon rekreante. En la hospitalo-sekcio funkcias fiziko- kaj meĥanoterapio, krome dentista duŝo. En ĉiuj sekcioj oni servas ankaŭ masaĝon kaj piedflegadon.

En la bankuvo-sekcio „Juventus" estas dudek kabinetoj kun ripozlito kaj duŝo; meritas intereson, ke la kuvojn eblas plenigi per plurspecaj kuracakvoj, diversaj laŭ temperaturo kaj kemia konsisto.

La naĝejo de Rudaŝ estas aparte ŝatata de la publiko dum la vintra sezono. Larĝeco de tiu baseno estas 12,9 m, longeco 21,6 m kaj profundeco inter 0,85—1,65 m. La tri etaĝojn alta halo estas baziliko-maniere formita, sekve tra altegaj flankfenestroj envenas natura lumo. En duetaĝa alteco, teraso de 240 m² surfaco prezentas eblecon por sunbanado.

El inter la Budapeŝtaj banejoj nur tie ĉi, en ties hospitalo-sekcio funkcias *duŝo por dentkarno*. Tiu kuracado tre utilas ĉe atrofio de gingivo, kaj ĝenerale ĝi bezonas 10—12 fojan manipuladon: en buŝo de la paciento pere de akvoradioj oni atingas efikon kvazaŭ masaĝan sur la dentkarno.

Certe la plej spektakla kaj grava parto de la Rudaŝ estas la plurjarcenta, originala turka monumento, la basenhalo, kiu eĉ nuntempe funkcias. En ties mezo troviĝas la okangula termoakvo-baseno, la plej granda — 96 m² — inter niaj turkdevenaj banejoj. Super ĝi la samgrandan kupolon subtenas ok dikaj kolonoj. Sur la kupolo — bone videblaj ankaŭ de ekstere — estas rondformaj kolorvitraj fenestretoj, tra kiuj la halo rice-

La turkdevena parto renovigita en la Banejo Király

vas taglumon kaj aldone elektran lumigon. En anguloj de la kvadrata halo troviĝas po unu eta baseno, plenigitaj per diversgrade varma termoakvo.

Apud la grandioza kabloponto, inter la krutaj rokoj de la Gellért-monto kaj la Danubo, la bordon ĉarme kaj rave ornamas la turkstila kontruo de la Banejo Rudaŝ.

Banejo Király

La sekva perlo de la Budapeŝtaj banejoj, al kiu ni nun vizitas irante pli norden preter la Danubo, montras same turkan stilon, kupolon kaj orajn duonlunojn. La klasicisma fronto de la Banejo *Király* — rigarde al la strato *Fő* (= ĉefa) — donas impresojn pri forpasintaj jarcentoj. Aparte ĉarme aspektas la verdaj kupoloj sur la renovigita turkdevena parto.

La historio de tiu banejo komenciĝis dum la turka regado en Buda. Verŝajne *Arslan,* paŝao de Buda, ekkonstruigis la banejon en 1565, kiam li renovigis apude la defend-murojn de la Danubborda kvartalo (Viziváros). Sed jaron poste Arslan perdis la fidon de la sultano, kiu ordonis lin sufoki; la konstruadon finis lia posteulo, la honorinda paŝao Sokoli Mustafa.

La akvo venis de alia loko, el fontoj de montetoj estis kondukita tra ŝtonaj kaj lignaj tuboj, kanaloj — tutcerte tial, ĉar la turkoj intencis banejon havi inter la urbo-muroj, sekure eĉ dum sieĝo.

Post reokupo de Buda en 1686, imperiestro Leopoldo la 1-a donacis al sia kortega kuraciston, Frederiko *Illmer* la banejon kune kun la Kota Banejo (Gellért). Lia filo vendis ĝin en 1703 al la komandanto de la Buda-fortikaĵo, Johano *Pfeffershoven.* La posedantoj plurfoje ŝanĝis sin, ĝis la nomdoninta familio *Király* (= reĝo) aĉetis kaj ekprosperigis ĝin. De tiam (1796) la banejo denove floradis. Ili konstruigis komence de la pasinta jarcento la klasikismajn domojn lige al la turka banejo, kaj fine de tiu



La klasikisma vestiblo de la Banejo Király

La novaj muroj ĉirkaŭas restaĵojn de plurjarcentaj muroj en la Banejo Király

jarcento la banejo apartenis jam al la tiutempe modernaj hidroterapiaj institutoj.

Dum la dua mondmilito la Banejo Király grave difektiĝis, tamen ĝi funkciis denove post oktobro 1945 kelkajn jarojn, kiam oni devis ĝin nepre fermi por longdaŭra restaŭrado. Tiun laboron direktis arkitekto Egon *Pfannl,* kiu sukcese rekonstruis la belan originalan formon de la banejo, ĝuste antaŭ dudek jaroj ree malfermita. La trankvileco kaj beleco, la novan kaj malnovan kuniganta harmonio, kiuj kaptas la vizitanton en interno de la Banejo Király, impresas tiel rave, kiel preskaŭ en nenia „historia" banejo de la lando.

Malantaŭ la ĉefa enirejo oni trovas sin en ne granda vestiblo, restaŭrita klasikisme. Helika ŝtuparo kondukas al la etaĝo, en vestiĝejon, de kie — post deviga piedbano — sur kelkaj ŝtupoj oni enpaŝas la turkepokan basenon. En la „Palma koridoro" videblas kuriozaj muroj: kvazaŭ la novaj muroj estimplene gardas — ĉirkaŭas restaĵojn de plurjarcentaj muroj. Ĉe fino de la koridoro atendas eta banmuzeo: malantaŭ forĝita ferpordo kuŝas lignaj tuboj, tra kiuj la turkoj transkondukis la termoakvon de la fonto en la banejon. apud ili Romiaj kaj mezepokaj restaĵoj el iamaj domoj de la ĉirkaŭaĵo. En alkovo estas eksponitaj el la turka epoko devenantaj kaheloj de fornoj, kanonkugloj, ŝtontajliloj, kandelingoj, akvokondukiloj. Kvankam pli ol kvarcent jarojn aĝaj, post eta prilaboro ili estus denove uzeblaj.

Fama kuriozaĵo de la Banejo Király estas la tn. *„paŝa-kuvo"* havanta egan volumenon de 1750 litroj. En tiu giganta kuvo banas sin nun, kiuj ŝatas la saŭnbanon. En la tiucela ejo trovis lokon apud la „paŝa-kuvo" ankaŭ unupersona saŭn-kamero, kaj duŝoj, ripozejo.

El inter la diversaj banejpartoj la plej populara estas ankaŭ nuntempe la sekcio de bankuvoj (37 kuvoj), kie oni kutimas post banado laŭdezira, eventuale post masaĝo trankvile kuŝi, eĉ dormi, aŭ utiligi frizistan kaj aliajn servojn. La intimaj bankameroj, tiuj etaj „sanktejoj" de la korpkulturo, viciĝas laŭlonge de la koridoro cirkaŭ la granda banejkorto. La banadon pliagrabligas — de printempo ĝis aŭtuno — la sunbanado en la baneja korto, ŝirmita de vento kaj ornamita per belaj statuoj kaj arboj.

En la banejo estas sanigeblaj artritoj kronikaj kaj kvazaŭ-akutaj, degeneraj artiko-malsanoj, vertebraj deformiĝoj, hernio de intervertebra disko, neŭralgioj, ostaj kalkmankoj, posttraŭmataj afekcioj, kaj aliaj. La publiko utiligas la termobanejon kaj la bankuvojn ankaŭ por refreŝiĝi, sin teni en plej konvena farto.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

HUNGARA DOLĈAJĴINDUSTRIA ENTREPRENO

interesa laboro...

MEDIKAMENT-FABRIKO

CHINOIN



Ĝi ofertas bonajn eblecojn por ellernado de fakoj.
Knaboj povas anonci sin metilernanto pri fakoj medikament-fabrikista (kemiista), serurista, veldista, elektrista, tornista, tubomuntista.
Knabinojn ni akceptas pri fako medikament-fabrikista (kemiista).
La metilernantojn pri fako medikament-fabrikado ni instruos en modernaj porpraktikaj laboratorioj kaj medikament-industriaj instrumetiejoj.

En nia boatejo (sur la kajo de Danubo „RÓMAI PART" por niaj metilernantoj ni zorgos ankaŭ pri senpagaj sportiloj.
NIA ADRESO: CHINOIN GYÓGYSZERGYÁR OKTATÁSI OSZTÁLY
Budapest, IV. Tó u. 1-5. Telefono: 690-900/531 substacio
kaj CHINOIN NAGYTÉTÉNYI GYÁREGYSÉG SZEMÉLYZETI OSZTÁLY
Budapest, XXII. (Nagytétény), Bányalég u. 2.
Koresponda adreso: 1325 Budapest, Pf. 110.

LITERATURA METIEJO

Márton Fejes

Per poemtradukoj el Attila József ni inaŭguris ĉi rubrikon (HV 1976/6); ankaŭ nun, okaze de 75-a datreveno de lia naskiĝo ni dediĉas niajn kolumnojn al la poeto. Same, kiel ĉe inaŭguro, ni elektis malfacilan taskon. La tradukintoj ĉifoje estis perletere varbitaj. Ne kalkulante kelkajn tute fuŝitajn provojn, tri niaj korespondantoj ensendis po unu varianton, kiujn ni povas kompari kaj analizi; fine staros la kvara solvo, kiun prijuĝi estas kompetenta nur la legantaro, konsekvence kaj severe aplikante ĉiujn vidpunktojn pritraktitajn kaj konsiderendajn.

I.

Attila József:

Malsato

Maŝina paŭz'. Ŝvebanta polvospec'
simila al vapor', nebulplumonoj
descendas sur la kurba kol' de homoj
manĝantaj nun. Ĉemizo friska pez'

traŝvita dorse. Voras nun sen ĉes'
el pan', kukum' tagmanĝaj ĉiuj homoj,
ne falu eĉ paneroj sub ĉezonoj,
post buŝopren' alvenas nova pec'.

Prizorgi tempon jam forgesis ili,
la buŝoprenojn bone ni aranĝu,
ja zorge maĉu hom' la pecojn for.

Ankoraŭ sanapulme devas spiri
kampulo polvon en la fojnodor',
sed laŭ la vol' vi manĝu nur, vi manĝu.

(T. P.)

II.

Maŝinohalt. La polvo de l' rikolt'
kiel nebul' aŭtuna, laca aras,
al kurbaj koloj de manĝantoj falas,
al ŝvitaj ŝultroj. Sur draŝeja kort'

manĝegas ili, manĝas sen la vort',
zorgeme, vore, eĉ la eron ŝparas.
Kukum' kaj pano la tagmanĝon faras,
kaj grandan pecon sekvas granda mord'.

Pri tempo ili jam tute ne pensas,
la fojnodoron kaj polvon enspiras
per la bona pulm' de homoj agraj.

Sinsekvas mordoj, en la tempo densas,
la pecojn dismaĉas dentoj akraj,
kaj voras ili, voras, ne babilas.

(Bella *Sipos)*

III.

Maŝino haltis. Polvo en l' aer'
cirkulas kiel aŭtuna vaporo,
defalas poste laca al la kolo
de nun manĝantoj. Varmo de somer'

ŝvitigas ŝultrojn. Manĝas sur la ter'
kukumon, panon ili kvaz' kun voro,
sed zorge manĝas ĉiuj, kun la volo,
ke el la manĝ' ne falu eĉ paner'.

Ili ne zorgas jam pri tempopaso,
enspiras polvon kun la fojnodoro
per bona, sana kamparana pulmo.

Intensas mordoj en paŭzo de draŝo
pecetojn dentoj maĉas per returno,
kaj manĝas ili, manĝas sen parolo.

(Zoltán *Peák)*

Dato de la poemo estas 1922, do ĝi estas peco el la komenco de poeta kariero de Attila József. En tiuj unuaj jaroj li verkis plejparton de siaj sonetoj, en kiuj jam ek-ekbrilas promeso de la poste elvolviĝinta grandeco. — Ĝuste en liaj plej regulaj, formperfektaj sonetoj, kiel ankaŭ en la elektita Éhség (Malsato). József ŝatis la sonetformon, ankaŭ malinklinis al ĝi. Menciindas, ke en la jaroj 1922—23 li verkis kvardekses, inter ili ankaŭ sonetkronon (Kanto de Kosmo), poste dum dekdu jaroj li tute ne verkis sonete, nur en la lastaj du jaroj de sia vivo li reiris al ili. (El tiu periodo estas lia sonetciklo: „Patrujo", vidu HV 1978/2.)

Malsato estas lia plej matura junaĝa poemo, ĝenro, en kiu realismo de detaloj kunstarantaj je tuto per ĝeneraliga forto spegulas sociajn subtavolojn. La disciplino de la klasika formo, la forta jamba ritmo harmonias al la elektita temo.

Tradukinto de la I-a varianto klopodis redoni ĉion, ĉiun detalon eĉ nuancojn, — eble ĝuste tiu ĉi febra klopodo malhelpis lin fidele speguli *la tuton,* redoni etoson de l' originalo.

Malsato estas klasika Petrarka soneto, diferencas de tio nur tiom, ke en la versoko krom kvinjambaj versoj (kun vira rimo) troviĝas ankaŭ dekunusilabaj versoj in-finaĵaj (rimformulo de versoko estas: abba abba), kaj la versseso havas iom nekutiman rimaranĝon: cde ced.

Interese, ĉiuj tri tradukintoj klopodis fidele redoni alternon de viraj kaj inaj rimoj. Tiu klopodo ŝajnas superflua kaj kelkfoje ekestigas arbitrajn solvojn, ĉar uzante virajn rimojn oni povas rimigi nur substantivojn, respektive ties radikojn.

Tamen, tiu parto de la rimaranĝo sidas en la I-a varianto. La sola manko estas ĉi tie, ke la tradukinto rimigas nur unu silabon, kvankam en la originalo staras rimoj dusilabaj. Plenan malsukceson ni povas

konstati ĝuste ĉe rimaranĝo de senproblemaj inaj versfinoj: *nebulplumonoj-homoj-homoj-sub bezonoj*. Elinter tiuj *nebulplumono* estas arbitre elpensita tropo, kiu ne troviĝas en la originalo; meze al *homoj* respondas *homoj,* kiu solvo ne havas rimefekton, estas simpla ripeto, *sub bezonoj* kiel rimo estus bona, se ĝi havus sencon, sed — almenaŭ en tiu ĉi kunteksto ĝi ne havas. La tradukinto per ia konvulsia rigideco koncentris sian atenton al jamba ritmado, kaj ĉiterene li sukcesis, Tamen, multe kostis tiu „sukceso": perdiĝis pro detaloj la tuto, la tradukaĵo staras neproksime al la originalo. Fideleco ne egalas servutulan imiton. Ni sentas ŝvitodora ankaŭ tiun klopodon de la tradukinto, ke li intencis redoni ĉion en la sama loko, kie tio troviĝis en la originalo. Redonis ankaŭ la transiron, *enjambement*-on inter du kvaroj de versoko. Tiaj transiroj ĉe senrimaj versoj ne havas signifon, en rimaj versoj interrompas la teksto n — do ne apartenas al nepre imitindaj virtoj.

Entute: la I-a varianto estas pala senforta provo. Kial ni citis ĝin tamen en plena amplekso? Unue: ĉar la ritmoaranĝo kaj kelkaj liaj solvoj tamen atestas pri rekrea kapablo, due: ĉar tiu traduko donis sufiĉe da okazo por analizo.

La II-a kaj III-a variantoj estas ĉirkaŭ samnivelaj, ambaŭ estas preskaŭ egale kontentigaj. Bella Sipos lerte solvis virinajn rimojn de la versoko, kaj ne estas riproĉendaj ŝiaj solvoj por viraj rimoj. Kvankam en la originalo nek unu vorto estas pri rikolto, respektive pri sekvanta tion draŝado, el tuto tamen evidentiĝas, ke pri tio temas. Tial ni ne sentas fremda, arbitra paŝo enkondukon de *rikolt'* kaj tiun de la al ĝi rimanta *draŝeja kort'.*

Pri simila rimtrafa sagaco atestas ankaŭ la III-a varianto. Cetere ĝia tradukinto estis la unua, kiu redonis la virajn rimojn dusilabajn. La versfino *„sur la ter' "* estas motivita, ja la draŝantoj certe ne manĝis sidantaj ĉe tablo, tamen la vokiva versfino *varmo de somer'* estas ioma deflankiĝo, ĝeneraligo, ja en la originalo samloke (ĉe *enjambement)* staras: traŝvitita malpura ĉemizo malvarmigas ilian ŝultron.

Ankaŭ la versseson bone solvis ambaŭ tradukintoj, malgraŭ tio, ke ambaŭ ili preteratentis, ke en la originalo la versoj 11-a kaj 13-a nombras nur dek silabojn.

En la versseso ĉe Zoltán Peák ĝenis nur unu afero: kunrimigo de *tempopaso* kun *draŝo,* sed ĉar la ceteraj solvoj estas bonaj, tiu eraro estas facile korektebla.

Ĉi nuna nia konkurseto eble sukcesis ion pruvi kaj demonstri: tion, ke la tradukado ne estas tamen tute senespera afero, ke eĉ pluraj kontentigaj tradukoj povas naskiĝi el la sama verko en la sama traduka lingvo.

Tamen pli nova traduko el sama poemo aŭ verko havas ekzistorajton nur en unu okazo: se kompare al la ĝisnunaj ĝi staros pli proksime al la originalo.

En tiu konvinkiĝo mi surpaperigas fine la kvaran varianton — la mian —, kaj lasos ĝin al juĝo de la legantaro.

Attila József:

Malsato

La draŝmaŝino haltis. Polva ar'
kiel nebul' aŭtuna, laca, lanta
kirliĝas super manĝantoj, falanta
kolen. Ĉemizo sur la ŝultro-par'

per ŝvit' fridigas. Zorge, kun l' avar'
avide manĝas ili, neniom da
kukum' kaj pano falu teren, granda
engluto sekvas post la morda far'.

Jam ili tute ne kalkulas horon,
pecetojn zorge maĉas, disentranĉas,
mordoj falas presk' en tempo sama.

Enspiras ili polvon, fojnodoron
per kampula pulm' ankoraŭ sana,
kaj manĝas ili, senparole manĝas.

(Márton *Fejes)*

Post la redaktofino alvenis du pluaj tradukoj, kiuj dank' al la ĵonglado de la enpaĝigistino tamen povas presiĝi:

Maŝino haltis. Polvo nun cirkulas
super ĝi, ŝajne nubo kaj vaporo,
kiu surfalas al fleksita kolo
de la manĝantoj. Jen ilin makulas

ĉemiz' ŝvitita. Nur pri manĝ' spekulas
ĉiuj. Pano, kukumo por voro
tagmeza. Ili kun granda rigoro
ĝin gardas. Mordon mord' postulas.

Antaŭ ili tempo kiel prujno.
La mordoj preskaŭ sin mem jam aranĝas,
sed ili bone maĉas ĉiun gluton.

Ankoraŭ sana, kamparana pulmo
akceptas fojnopolvan spiroguton,
ili silentas, manĝas, manĝas, manĝas.

(Tibor *Bessenyei)*

Haltis maŝin'. Polv' laca de l' rikolto
kvazaŭ nebul', vapor' aŭtunaj aras,
fleksitajn kolojn, ŝvitajn ŝultrojn falas
ĉe la manĝantoj. Sur draŝeja korto

malpurĉemize voras nun sen vorto
zorgeme homoj, eĉ la erojn ŝparas.
Pan' kaj kukumo la tagmanĝon faras,
panpecon grandan sekvas kukum-mordo.

Pri l' tempo ili jam ne pensas tute,
la mordoj jam preskaŭ senhalte tranĉas,
sed ili bone manĝas ĉiun gluton.

Ankoraŭ sana pulm' kampula mute
enspiras polvon, fojnan odorguton.
La homoj manĝas, senparole manĝas.

(Péter András *Rados)*

GAJA PAĜO

Ekzistas ankoraŭ diferencoj pri vidpunktoj:

La grandan stalon de la ĉevalkonkursejo rajtas rigardi ankaŭ la spektantoj. Foje frapis la okulojn nova tabuleto ĉe la enirejo:

LA VIZITANTOJ
ESTAS PETETAJ
NE NUTRI LA ĈEVALOJN
PER SUKERO.
La stalistoj.

La sekvan tagon aperis subskribite:

NI PETAS LA VIZITANTOJN
NEGLEKTI
LA SUPRAN TABULON.
La ĉevaloj.

Kaj en interno de la klubejo:

— Post konkurso — diras trejnisto — mi ĉiam partoprenas la prezidantaro-kunsidon, kaj kredu, ke eĉ post doloriga fiasko estas mi, kiu diras la lastan vorton!

— Kiel tio eblas? Kio estas tiam ankoraŭ direbla? — amiko miras.

— Nu, tio, ke bonvolu pardoni!

Diabla animo:

kiu vizitas ĉevalkonkurson *nur* por malice primoki la perdintojn.

Diable kvieta animo:

— Mi telefone vokis la servon de „Spirita Helpo", por ke ili min iel trankviligu. Post minutoj mi jam kverelis kun tiuj azenoj!

Prezidanta anonco (ne el Esperantujo):

„Mi, prezidanto de Ku-Klu-Klubo, serĉas estraranon, kiu en ĉiu disputo akceptas mian pravon."

Ne iam en UK:

— Altestimata s-ro verkisto, kiu estas via plej ŝatata aŭtoro?

— Mi.

Ne intermiksu kun la supraj!

Iu el la serie falintaj diktatoroj triste melankoliadas:

— Dum mia longa regado mi akiris multe da sperto *pri la vivo.* Tamen la tuto estas resumebla en tri vortoj: *ĝi pasas plu.*

Foje profesion serĉante:

— P l u v a s ! Ho, mi kuros por ricevi licencon pri ombrelista metio!

Okaze ja okazas:

— Ĉu vi naskiĝis el legitima geedzeco?

— Parte patre.

— Kiele?

— Ja mia patro estis edzo, dum mia patrino restis fraŭlino.

Aliloke ja okazis:

— Kiel fartas via karega edzino?

— Mia *karega* edzino, ĉu? Vi devas ja memori, ke mi havas nur unu edzinon!

Ni lasu pace la virinojn!

S-ro solene deklaras al sia amiko:

— Amiĉjo, estas decidite, mi edziĝos! Ŝiaj gepatroj jam konsentis, ŝi akceptis plenkore, krome ankaŭ ŝia edzo ne kontraŭas!

Hoppardonu! Ni tute lasu ilin ! !

Al la arbara restoracio venas kiel gastoj leporeto kaj leono. Leporeto mendas grandvoĉe: — Por mi brasikon kaj kelkajn karotojn!

— Kaj via amiko kion deziras? — demandas kelnero.

— Nenion! — Kiel? Ĉu li ne estas malsata? — venas ree demando.

— Stultaĵo! Ĉu ni venus kune, se li malsatus?

E. F.



Romianoj, timtremu!

Asteriks, la Gaŭlo. Bildrakonto. Teksto: Goscinny. Desegnaĵoj: Uderzo. Esperanta traduko: Internacia Tradukrondo. Delta Eldonejo SKLG, Stuttgart, 1979. 48. p., 29,5 cm. Bindita. Kolorilustrita. Prezo: 11,— ned. gld. (Por Hungario: 110,— forintoj.)

La grandformata libro surprizas unuavice per sia lukseco: verŝajne ĝi estas inter la dek, se ne plej belaj, certe plej allogaj libroj, iam ajn eldonitaj en Esperanto. La lukso tamen ne ŝuldiĝas al abrupta riĉiĝo de niaj eldonejoj: ASTERIKS, LA GAŬLO estas bildrakonto tre populara en Okcidenta Eŭropo, ĝi estas vendata en milionoj da ekzempleroj. Ĝis nun ĝi aperis en dudeko da naciaj lingvoj, kaj fine ankaŭ en Esperanto.

La agado okazas 50 jarojn a.K. en malgranda gaŭla vilaĝo, kiun la romianoj ne sukcesas konkeri. La fortajn legionanojn haltigas malgrandstatura, lipharhava gaŭla viro, nomata Asteriks, kiu, dank' al speciala eliksiro, estas nevenkebla...

La ĉ. 500 plurkoloraj, humure desegnitaj bildoj rakontas pri la aventuroj de Asteriks. Li muelas multe da pipro sub la nazon de la romianoj, kaj fine triumfas dank' al ties stulteco kaj potencavido. La historio certe amuzos ĉiujn infanojn kaj plenkreskulojn, kiuj entute pretas amuziĝi.

La traduko estas ĝenerale bona, kvankam kelkloke iom peza. Ekzemple anstataŭ „Oni ne volis doni al mi da Eliksiro ..." pli volonte mi legus simple: „Oni ne volis doni al mi Eliksiron ..." „La romianoj kondutas suspekte kviete ..." evidente devus esti „suspektinde kviete". Tamen, tiuj etaj misaĵoj ne multe ĝenas.

Ne necesas esti aŭguristo por antaŭdiri, ke tiu ĉi libro furoros ĉie, kie ĝi estos vendata. Ni esperu, ke la lastatempe sinsekve aperintaj bildrakontoj iom vastigos la Esperantan legpublikon, kaj tiuj homoj, kiuj unue eklegas „Asterikson" aŭ la hungarajn bildrakontojn, baldaŭ fariĝos konsumantoj ankaŭ de la vera Esperanta literaturo.

V. *Benczik*

La plej forta

1. Nanaja[1] fabelo

Nameko, juna knabo, ofte diris al siaj amikoj:
„Mi estas la plej forta en la mondo."

Foje, Nameko glitkuris kaj falis. Lia kapo forte albatiĝis al la glacio. La knaboj diris al li:

„Ne estas *vi,* kiu estas la plej forta; la glacio batis vin."

Nameko demandis la glacion:

„Aŭskultu, glacio! Ĉu ekzistas iu, kiu estas pli forta ol vi?"

„Jes", respondis la glacio. „La suno estas pli forta ol mi. Kiam ĝi brilas, mi degelas."[2]
forta ol vi?" Kiam ĝi brilas, mi degelas."[2]

La knaboj iris al la suno. Ili longe marŝis. Fine, ili alvenis.

„Hej, suno! La glacio venke batis min; vi igas la glacion degeli; sekve, vi estas pli forta ol mi."

La suno longe meditis[3]; poste ĝi respondis:

„La nubo estas pli forta ol mi. Kiam ĝi kovras min, miaj radioj ne povas ĝin penetri."

La knaboj iris al la nubo. Ili suriris altan mondon, kaj ekvidis la nubon. Nameko diris:

„Aŭskultu, nubo! La glacio estas pli forta ol mi, la suno estas pli forta ol la glacio, vi estas pli forta ol la suno; sekve vi estas pli forta ol ni ĉiuj."

Sed la nubo ne povis respondi, ĉar vento leviĝis kaj forpelis la nubon. Tiam Nameko vokis al la vento:

„Aŭskultu, vento! La glacio venkis min, la suno igis la glacion degeli, la nubo kovris la sunon, vi forpelis[4] la nubon. Vi estas, do pli forta ol ni ĉiuj. Ĉu vi povas ekmovi monton?"

Forte ekventis: sed la monto staris kiel antaŭe.

„Eĥ!" diris Nameko. „Jen la monto estas pli forta ol vi!"

„Monto! Monto!" vokis Nameko. „Ĉu, do, vi estas la plej forta?"

„Ne", respondis la monto. „La arbo estas pli forta ol mi. Ĝi kreskas sur mia dorso, kaj diserigas min per siaj radikoj."

„Ej, aŭskultu, arbo! Ĉu vi estas, do, la plej forta?"





La arbo ekzumis[5] per la folioj:

„Jes, mi estas la plej forta!"

„Nu, tio ne estas vera!" responde kriis Nameko. Li kaptis hakilon, kaj faligis la arbon.

Kaj ĉiuj ekvidis, ke la homo estas la plej forta en la mondo.

---

1. nanajo: ano de popolo en Sovetunio/ 2. farigas flua/ 3. pensis profunde/ 4. foririgis/ 5. murmuris per sono: ssss.

(El „Juna Amiko")

Ivan Draĉ

Balado de malfermitaj infanaj okuloj

Mi volas vidi la mondon per malfermitaj okuloj.
Mi estas ankoraŭ eta, mi scipovas nur vidi,
Aspiras mi la panjon vidi ĉiam gaja,
Aspiras mi la sunon vidi en orĉapeleto,
Kaj la ĉielon vidi en blua tuketo.
Dume mi ne scias, kiel odoras Virto,
Mi ne scias, kiel gustas Malnoblo,
Kian koloron havas Envio, kia estas Malĝoj'?
Kiel sala estas Ĉagreno, kiom profunda Amo,
Kiel bluokula Sincero, kiel trembrila Malic'?
Mi ĉion metos sur la bretojn poste.
Sed ĝis mi elkreskos, faru ion en la mondo,
Por ke mi neniam fermu la okulojn por Timo,
Ne ŝangŭ plenkreskule proporciojn.
Aglój rigardas al suno per malfermitaj okuloj.
Infanoj rigardas la mondon per malfermitaj okuloj.

El la ukraina: Nadia *Andrianova*



HUNGARA DOLĈAJINDUSTRIA ENTREPRENO

OBLIKVA KRUCENIGMO

DEKSTREN MALSUPREN

1 — Nomo de greka litero. 2 — Spirebla gasmiksaĵo. 3. — Parto de la fiziko, studanta lumfenomenojn. 4 — Lirika poemo — briliga tega substanco. 5 — Vicmontra numeralo — malkorekta, malĝusta. 6 — LA UNUA PARTO DE LA PROVERBO. 7 — Mergante lavi — rapide graviĝanta (malsano). 8 — Fazeolsimilaj grajnoj — prezentejo en cirko. 9 — Konstruaĵoj por loĝado — monunuo en kelkaj ŝtatoj (diademo). 10 — Virseksan homidon — greka dio de la ventoj. 11 — LA DUA PARTO DE LA PROVERBO. 12 — Regulaj ses-edroj — aloj' el fero kaj karbono. 13 — Malantaŭa parto de la kolo — greka prefikso signifanta „rekta". 14 — Ankoraŭfoja, ripeta. 15 — Malmole (neol.). 16 — Konkluda kaj insista konjunkcio.

MALDEKSTREN MALSUPREN

7 — Nomo de la litero Ŝ. 8 — Korneca birda buŝo. 9 — Mezurunuo de el. kapacitanco. 10 — Ritma laŭmuzika movad' — ara, kolektiva. 11 — Kun angora timo — nia planed'. 12 — Parazita insekto el la ordo de hemipteroj — febra stato kun halucinacioj. 13 — Subteraj, ofte subdomaj provizejoj — Azia ŝtato ĉe Tigrio kaj Eŭfrato. 14 — Numeraloj — riza brando. 15 —Malhelruĝa diafana juvelŝton' — havigo al si. 16 — Dekmembra kolektiv' — abrupta, forte klinita. 17 — En du fojoj — per reto. 18 — Multvalora metalo — rilata al rara gaso (uzata en lumreklamiloj). 19 — Ĉambro — aŭdebla aervibrado. 20 — Glueca knedebla tero. 21 — Jugoslavia prezidento. 22 — Kondiĉa subjunkcio.



HELPILOJ: 10 — Eolo. 12 — Ĝis — cimo.
Oni alsendu la proverbon.

Stano *Marček*

Ĝusta solvo de la enigmo en n-ro 1979/6: *Pli bone ne fari, ol erari; Kapuĉo monaĥon ne faras; Ne venos rato mem al kato.*

Libropremion gajnis: Dieter *Berndt*, 102 Berlin, Berolinastrasse 2, DDR; László *Mauksinszky*, 6722 Szeged, Bartók B. tér 4. II. 1. Hungario. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Libro de romanoj

Vilmos Benczik

Per „Libro de romanoj" Vilmos Benczik revivigas la verkojn per kiuj faris siajn unuajn paŝojn nia originala Esperanto-prozo. La ĉarmo de tiuj ĉi kelkaj romanoj ankoraŭ ne tute malaperis kaj ili ankoraŭ per kelkaj siaj partoj vekas la intereson de la vasta legantaro.

1. Kun kiu forkuras el la patra domo la grafino Alvino von Rothenfels, figuro de la romano „Mirinda amo"?
2. El kiu romano estas la sekva frazo:
„Li mortis en la hospitalo por Trovitaj-Infanoj: li ne vivis plu ol dudek-kvar horojn."
3. Kiam kaj kie aperis la romano „Pro Iŝtar"?

NOVA BILDRAKONTO EN ESPERANTO!



GÉZA GÁRDONYI

STELOJ DE EGER

LETERKESTO

Venda Löiv, SU-Estonio, *Viljandi:* Kiel prezidanto de la urba E-klubo vi kunigis la opiniojn de la klubanoj pri HV: multaj ĝin abonas inter ili, (vi mem estas abonanto jam de 1961) ĉar oni trovas ĝin plaĉa kaj interesa por plej diversaj gustoj. Dankon! Verdire ni ne „plendas" pro manko de leganto-opinioj: ni simple *bezonas* ilin! Kial? Ĉar *bonan revuon redakti* en internacia rilato eblas nur, se la redakcio konas la gustojn, dezirojn kaj preferojn (ankaŭ ties kontraŭaĵojn) de la *multnacia legantaro.* La E-programoj de Radio Budapest, kiujn vi fervore aŭskultis meze de la 60-aj jaroj, ĉesis ja, laŭ via prava rimarko pro manko de reeĥo! Tiom da eĥoj certe ne bezonas revuo, sed „tra densa mallumo" necesas ke *briletoj* ie-tie servu kiel vojmontriloj. La pliiĝanta abonantaro de HV vere ŝajnas pravigi nian redaktadon — laŭ grandaj linioj. Salutojn al ĉiu klubano!

Martta Halonen, Finnlando, *Kajaani:* Via studo pri rava parto (poemo) de *Kalevala* estis niaflanke kun intereso legita. Ni komune bedaŭris poste, ke pro siaj literaturaj kaj finnaj specifaĵoj, ĝi ŝajnas ne konvena por publikado. Akceptu ankaŭ apartan salu-

ton de la ĉefred., kiu bone memoras pri la persona renkonto tre agrabla dum januaro de 79.

Noémi Leipnik, R, *Beius:* Por la venontjara internacia invalido-kampanjoj literaturaĵoj estas ankaŭ serĉotaj niaflanke. Novelojn, aliajn specojn ni povos utiligi nur, se ili venas al la redakcio E-lingve kiel originalaj. Principe ni ne tradukas senditajn manuskriptojn, kaj ni esperas vian komprenon tiurilate.

Gaston Trémon, F-87350, *Panazol,* 31. str. Turgot: En la kadro de la E-Ligo Filatelista oni serioze okupiĝas pri novkatalogizado de la porokazaj *E-glumarkoj,* ĉar la ĝisnunaj (jam tri!) tute ne malgrandaj volumoj-katalogoj finis siajn listojn en 1972, la 57-a UK en Portland. Ni konsentas, ke tiu propaganda kaj arta agado ofte signas la viglecon de la movado, eĉ pli, la glumarkoj apartenas al la historio de la E-movado. Tial ni konsideras vigliga vian alvokon (al la esperantistaro) pri kolektado, interŝanĝo, informado pri la plej diversloke troveblaj, eldonitaj aŭ eldonotaj E-glumarkoj! Studante vian cirkuleron ni vidas en lertaj manoj la aferon ĉe vi, kiel glumarka-fakulo de la menciita Ligo. La modernaj tefnikaj rimedoj (fotokopioj, grandigo) igas certe pli interesa tiun ĉi hobion intelektan por multaj, kiuj povas fiere prezenti al la geamikoj siajn albumojn.

GIM Ĉil-hjen, Sudkorea Resp., *Seŭlo:* Kun speciala plezuro ni legis vian leteron, est. redaktoro de LA ESPERO! Vere interese estas, ke pri enkonduko en lernejoj, la IL trovas ofte similajn malfacilaĵojn en via lando, kiajn vi legis en HV, en intervjuoj kun ministroj. La inundo, detruinta Szeged kaj la sekvinta internacia helpagado, se kaptis viajn korsentojn, des pli kompreneble kaptis niajn dolorsentojn la informoj pri la teruraj tajfunoj, kiuj lastatempe plurfoje kaŭzis egajn damaĝojn ĉe la marbordo. Ni esperas, ke la unueco de la popolo sukcese restarigos, kio detruiĝis, kaj vi sukcese povos utiligi la sindonemon de la unuiĝoj kaj de la personoj. Dankon pro via aprezo!

F. Erdős, R.: Ĉar el via letero ne klariĝis via adreso (eble ie sur intertempe perdiĝinta koverto: oni devas scii, ke adreso *devas esti* nepre sur leterpapero por ne perdiĝi!) ni sendis la ne-alvenintan nron 79/2. al la Rumania E-Komitato por vi. Kaj al vi, kaj *al pluraj aliaj* reklamaciintoj/ontoj: bonvolu *reklamacii* tie, kien vi rekte pagis! La redakcio (feliĉe) ne okupiĝas pri la distribuado, sekve ne povas helpi efike al vi.

Korespondi deziras

Esperantlingva familio (edzino: Grazyna, filoj: Tomasz k Mariusz) kun similaj familioj, pri muziko, literaturo, E-movado, ankaŭ reciproke viziti. Inĝ. Czeslaw *Jasionowski,* PL—65-536 *Zielona Góra,* str. Gwardii Ludowej 8/57. — Vilmos *Torró* (45) grafikisto, kolektas, interŝ. ekslibrisojn, R-4055 *Covasna,* str. Zorilor nr. 1. — Edgard *Homiĉ* pri muziko, literaturo, historio, popolkutimoj, kol. ekslibrisojn, bk, poŝkalendaretojn, E-aĵojn. SU-350 000 *Krasnodar,* ab. jaŝ 4. — S-ino Aune *Rinne* (60) kun hungaraj pensiuloj spertaj esp-istoj, SF-20810 *Turku,* Finnlando, Tervahovink 9/c. — Alberto Mario *Pozzali* (34) funkciulo, fraŭlo, dipl. psikologo, ŝatas praktiki sportojn, vojaĝi, pri literaturo, muziko, kun geamikoj, prec. hungaraj. I-20 127 *Milano,* via Natale Battaglia, 29. — Novaj esp-istoj atendas leteramikojn (16-40 j.) skribu al Raulinaitis *Stasys,* SU-234 431, *Jurbarko,* Skirsnemuné, Litova SSR — Paravin S. A. (17) laboristo, pri lingvoj, fotado, historio, kol. bk, librojn pri fotado, E-aĵojn, ĉokolad-etikedojn ktp. kun 15-30 jaruloj, resp. garantiata. SU-683 019 *Petropavlovsk—Kamĉatski,* Automobilistov 51-73. — F-ino *Iljina* O. A. (17) atendas interesemulojn pri lago Bajkalo, Siberio, E-lingve aŭ germane, SU-665 710 *Bratsk* str. Pihtovaja 44/A73. — F-ino *Saharova* T. A. (26) pĉt. ktm, pri naturo, bk, E-lingve, angle, germane. SU—665 710 *Bratsk* str. Snejnaja 35, kv. 24. — Sergej *Koĉatj,* prez. de urba E-organizo, ktm. SU-350 049 *Krasnodar* ul. Gagarina 145, kv. 11. — Instigu kaj kuraĝigu junajn gekursanojn ĉe lernejo Zespol Szkól, 5, PL-97-200 *Tomaszow* Maz. ul. Tkacka 11. Esp. Klubo. — E-grupo ĉe Ukrainia Akademio de Sciencoj, div. intelektuloj dez. koresp., SU-252 003 Do Vostreb., *Kiev,* al. A. M. *Bogdanov.* —

HUNGARA VIVO * Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits.** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Ggergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,— al eksterlando por unu jaro 78,— forintoj * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. — 80. — 172. — Nyírségi Nyomda Responda gvidanto: Zoltán Jáger, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Lingvajn leciojn Vi povas iam ajn reaŭskulti per magnetofono

BRG



Markitajn,
unikajn
produktaĵojn
de

POPOLARTO

Vi povas
aĉeti en
Budapeŝtaj
kaj
provincaj
vendejoj de

POPOLARTA KAJ HEJMINDUSTRIA ENTREPRENO

EN 80 LOKOJ
DE HUNGARIO

NÉPMŰVÉSZETI · ÉS · HÁZIIPARI · VÁLLALAT